Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 18 **Trimonata** **okt.-dec. 1988**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Redaktisto: István Ertl, Universitato ELTE, Budapest
Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ 36 1 180 966/185

Presado: Grafika Centro Antverpeno,
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Koutny, I – *La rolo de komputilo en la instruprocezo* 1
Kisfaludy, K. – *Instruado de Esperanto per parolanta komputilo* 7
Herrmann, A. – *Kie la musoj kaŝiĝas? (didaktika bildo)* 10
Csiszár, E. – *Antinomio de lerneja lingvaĵo al la aplikebla* 11
Mattusch, H.-J. – *Pri la projekto de internacia altlerneja Esperanto-Lernolibro* 18
Tangerud, O. – *Priparolata tempo – relativa tempo* 19
Nia Leterkesto 23
ILEI/UEA ekzamenoj lanĉitaj ekster la UK 24
Libroj, gazetoj, interesaĵoj 26
Renkontiĝoj (IMS, Freinet, Metodiko) 28
Anoncoj kaj raportoj 31
ILEI labortable 33

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout); tel. (03)666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Zsókavár ut. 46 IX 36, H-1157 Budapest; tel. (1) 564-093 aŭ 563-659 — Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : Audrey Childs-Mee, Postbus 25041, NL-3001 HA Rotterdam; tel. (010)425.4625 — Rilatoj kun sekcioj, membroj kaj kun UEA. Internaciaj korespondaj kursoj. Pedagogia prizorgo de infanaj kongresetoj de UEA.

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

Membroj : Till Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Jarkolekto 18 **okt.-dec. 1988** **N-ro 4, 1988**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas trifoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj, eĉ rekomendataj, kune kun fontindiko.

LA ROLO DE KOMPUTILO EN LA INSTRUPROCEZO

KOUTNY Ilona

En la lasta jardeko nova kaj interesa ilo aliĝis al la rimedaro de instruado kaj ofertis grandajn ŝanĝojn por ĝi: tio estas la mikrokomputilo. Kompreneble, ĝi ne volas kaj eĉ ne povas anstataŭi la homan instruiston, sed ĝi proponas al li efikan ilon kaj al gelernantoj allogan hejman helpilon, ekzercigilon. Dependas de ni, instruistoj, ĉu ni trovas ĝian konvenan lokon inter la instruhelpiloj. Tiu ĉi artikolo esploras la rolon de komputilo en la instru- kaj lernprocezo iom pli detale, do KIAM, KIEL kaj KION ĝi kapablas instrui. Ni koncentriĝas al la lingvoinstruado. Tiu ĉi nova tereno nomiĝas Komputile Asistata LingvoLernado, mallonge KALL (el la angla Computer Assisted Language Learning, mallonge CALL)

1. Kiam uzi komputilojn en la instruado

Ni konsideras la rolon de komputilo *kompletiga*, kvankam ekzistas programpakaĵoj por memstara lernado same kiel lernolibroj kaj sonmaterialoj. Ili estas uzeblaj, se pro iu kaŭzo la lernemulo ne havas eblecon konsulti instruiston.

La instruisto mem povas apliki komputilon *dum la studhoro kiel demonstrilon, kiel modelilon* de iu procezo. Per komputilo eblas pli rapide prezenti, havigi pli kompletan, koloran desegnon kaj simple ŝanĝi la parametrojn. Dum lingvoleciono ĝi povas prezenti taskojn, kiujn la lernantoj solvas per la gvido de la instruisto. Ekzemple la aventurprogramo "Grandville" (vd Kecskés) ofertas eblecojn por turisma vojaĝo (urbojn, hotelojn, vidindaĵojn, prezojn) kaj la lernantoj pri la franca diskutas, kion elekti.

Per komputilo la instruisto povas ankaŭ *kontroli* la lernantojn, se estas pluraj komputiloj je dispono. La gelernantoj ricevas la taskaron tra la komputilo kaj la solvo kaj ties taksado registriĝos. Tiel la instruisto ne bezonas pene korekti ilin, ja tio jam estas farita precize, sufiĉas kompari kaj analizi la erarojn. Ĉe tiuj testoj aŭ similaj taskoj estas ĝenerale facile ŝanĝi la datumojn, pro tio ne nepre ĉiuj devas fari la samajn taskon aŭ oni povas refari la saman problemon, sed per aliaj vortoj. Kaze de reto eĉ dum la laboro de la gelernantoj la instruisto povas interveni, kontroli kaj helpi ĝin.

La plej grava rolo de komputilo aperas ĉe la *memstara ekzercado* de la gelernantoj en la lernejo aŭ hejme. Kompare kun lernolibro (aŭ magnetofona sonmaterialo) ĝi havas plurajn *avantaĝojn*:

* ĝi estas *interaga*, t.e. ĝi prezentas la taskon kaj post la respondo de la lernanto tuj reagas: akceptas, helpas aŭ korektas kaj poste ĝi prezentas la novan taskon. Tiel la lernanto ne perdas la interesiĝon.
* eblas lerni *laŭ individua ritmo* (kontraste al la magnetofona ekcercado), la komputilo pacience atendas la respondon, laŭ peto ripetas aŭ donas helpon por la solvo. Ĉe bone ellaborita programpakaĵo la proponata sekva tasko dependas de la solvo de la antaŭa.
* la *taksado estas tuja kaj objektiva*, tiel ne fiksiĝas eraraj formoj en la kapo de la lernanto.

2. Kiel apliki komputilojn

Komputilo estas helpilo en la instruado, sed tio ne signifas, ke oni devas simple enkomputiligi kelkajn el la ĝisnunaj taskoj. Male, oni devas *eluzi la specialajn eblecojn* de la nova ilo kaj trovi taskojn, kiujn ĝi pli bone, pli simple, rapide aŭ pli precize povas plenumi ol instruisto aŭ la aliaj disponeblaj iloj.

Komputilo estas *kompleksa ilo:* ĝi povas prezenti la taskon en teksto kun bildoj simplaj kaj eventuale eĉ voĉe. Pleje konvenas la taskoj, kie la respondo estas unu vorto aŭ kelkaj antaŭvideblaj variantoj. (Tio ja estas malavantaĝo kompare kun la instruisto, kiu povas akcepti iun ajn ne antaŭviditan respondon, eĉ el la duone dirita li jam konjektas la bonan daŭrigon.)

Komputila taskaro estas pli simple *ŝanĝebla*, ĝisdatigebla ol lernolibro. La tielnomataj *aŭtoraj programoj* ofertas iun ŝelon por iu taskotipo kaj la instruisto plenigas ilin per la necesa datumaro: vortoj, tekstoj, gramatikaĵoj.

Eblas kolekti, kiuj vortoj kaj kiom ofte estis uzataj. Taskoj povas *ripetiĝi* laŭ hazarda aŭ planita maniero. Por ke la studmaterialo fiksiĝu, necesas ripetiĝo

en iu formo. R. Gérard prezentas algoritmon por planita ripetiĝo laŭ la malfacileco de la tasko.

Helpo en la solvo kaj taksado estas gravaj problemoj. Ĝenerale per premo de butono alvenas helpo aŭ post la unua malbona solvo aŭtomate. Estas pli konvene, se la lernanto havas eblecon ankoraŭfoje provi solvi la taskon, se tio ne sukcesis la unuan fojon. Ĉe bona solvo povas okazi laŭdo. Kiam la lernanto finas la laboron, la sistemo povas komuniki la atingitan rezulton.

3. Kion eblas instrui kaj ekzercigi per komputiloj

Gramatikaj taskoj estas ĝenerale facile aŭtomatigeblaj, ĉar la korekta solvo estas antaŭdifinebla interalie en la kazo de:

* elektaj aŭ kompletigendaj testoj (ekz. enmeti prepoziciojn, finaĵojn, verboformojn ktp),
* transformoj (ekz. el singularo al pluralo, el prezenco al preterito, el aktiva al pasiva voĉo ktp),
* starigo de demandoj al donitaj frazoj.

Leksikon same eblas ekzercigi per komputilo, ekzemple:

* enmeti la konvenajn vortojn en truhavan tekston,
* doni la vorton petitan de la difino,
* respondi al demando.

Komputila *vortaro* povas helpi la lernadon. La lernanto povas fari ankaŭ sian propran vortaron kaj kontroli sian scion per ĝi.

Nuntempe la *komunikada kompetento* ricevis grandan emfazon en la instruado de fremdaj lingvoj, t.e. instrui al la lernantoj kiel komuniki en fremda lingvo. Tio envolvas la evoluigon de la 4 komunikkapabloj: skribado, legado, parolado kaj aŭskultado, kiujn oni klasifikas ĝenerale sekve:

	receptiva (percepta)	**produktiva** (krea)
skriba	legado	skribado
parola	aŭskultado	parolado

Anstataŭ la tradiciaj gramatikaj kaj tradukaj ekzercoj la lernantoj devas uzi la lingvon en diversaj vivaj situacioj (vd la rolludojn de S. MacGill). Sed kiel instrui la parolan komunikadon per muta komputilo? La komputilaj instrusistemoj povas evoluigi nur la skribadon kaj certagrade la legadon el inter la 4

komunikkapabloj. Ankaŭ tie temas nur pri la korekta skribado – ortografie kaj gramatike – , kaj ne pri skriba esprimkapablo. Ĉi-lastan povas kontroli nur instruisto, ja la komputilaj sistemoj ne kapablas kompreni la homan lingvon (kvankam komputolingvistoj laboras pri tio), ili kapablas kontroli laŭ formaj kriterioj. Tio estas nun la limo de komputila instruado.

Kvankam la komputilo ne povas kontribui al ĉiuj fazoj de la instruado, ĝia rolo estas grava en la elformo de *gramatika kompetento* kaj *leksika scio*, kiuj estas la bazoj por komunika kompetento.

4. Sintezita parolo en la instruado

Vasta gamo de programoj helpas la lingvoinstruadon, sed tamen io baza mankas, tio estas la *parola komunikado,* kio estas ne nur formo, sed ankaŭ enhava parto de la lingvoinstruado. Cetere la komputila instruado de iu ajn studobjekto estas pli natura, pli amikeca, se la prezento kaj la taksado de la tasko okazas parole.

Instrui parolon eblas nur per *parolo!* Por ke la komputilo transprenu ĉiterene el la laboro de instruisto, ĝi devus kompreni la parolon de la lernantoj kaj respondi parolante. La unua kazo, la *aŭtomata parolrekono* estas ankoraŭ malproksime. Jam ekzistas sistemoj, kiuj 'komprenas' homan parolon, do ili transformas la parolitan tekston al skribita, se la parolanto prononcas la vortojn kun paŭzo inter ili. Sed la rekono de flua parolo – eĉ kun eventuala erara prononco ĉe lernantoj de la lingvo – ankoraŭ ne estas solvita kontentige. M.-Th. Janot-Giorgetti aplikis la rekonon de aparte diritaj esperantaj vortoj en la instrusistemo MikroLEA.

La *komputila genero de parolo* estas pli simple solvebla kaj jam pluraj lingvoj estas aŭtomate generitaj. Ĉirkaŭe antaŭ dek jaroj aperis la lernilo-ludilo *Speak and Spell* ['diru kaj literumu'], kiu surbaze de la angla parolgenero ekzercigis la anglan ortografion. Tamen la uzo de sintezita parolo ne vere disvastiĝis en KALL. La anglalingva superrigarda verko: *Computers, Language Learning and Language Teaching* traktas la uzon de sintezita parolo en la instruado nur mallonge en la ĉapitro de 'Evoluigoj'. Tion kaŭzas ĝenerale la ne sufiĉe alta kvalito de la generita parolo.

La parolgenero laŭ reguloj (kiam ĉiu ajn teksto, skribita laŭ la kutima ortografio, transformiĝas al parolo sen kroma manipulado homa) diferencas en kvalito pro la diverseco en:


* la reguleco de ortografio (kiom-grade la lingvo estas fonemika);
* sonsistemo (kiom da komplikaj kaj proksimaj sonoj enestas) kaj
* regula akcentado kaj intonacio en la diversaj lingvoj..

Laŭ tiuj kriterioj eblas produkti sufiĉe bonkvalitan esperantan parolon (vd Koutny, Olaszy). Unue B. A. Sherwood sintezis esperantan parolon kaj tuj uzis ĝin en instruado kadre de la sistemo PLATO komence de la okdekaj jaroj. Li ekzercigis vortojn per komputila parolo kaj simplaj surekranaj bildoj. Laŭ lia tiama konstato: "Esperanto estas la sola lingvo, kies sintezo estas adekvata por fremdlingva instruo pere de Votrax VS-6" [sintezilo] (vd Sherwood 1981).

En 1987-88 ellaboriĝis la parolgenera sistemo ESPAROL en la Budapeŝta Teknika Universitato (Koutny, Olaszy, Czapp) surbaze de la jam ekzistanta hungara sintezo. Tiu ĉi sistemo funkcias sur komputilo Commodore '64 aŭ 128 per sintezila aparato kuplita al la komputilo (varianto por IBM PC estas evoluigata). Oni povas aktivigi la paroladon el la programlingvo BASIC. (Anoncon pri ESPAROL vd IPR 88/1.)

Katalin Kisfaludy verkis esperantan enkondukan kurson por tiu ĉi sistemo kaj faklaborajon. Pri tio kaj la efektiva kurso, kiun ni organizis ĉe HEA en la aŭtuna semestro vidu ŝian artikolon en tiu ĉi numero. (La programaro estas parto de la aĉetebla sistemo.)

Helpe de parolsintezo la komputilo povas kontribui ankaŭ al la *evoluigo de la aŭdkapablo* de la lernantoj. Ekzemple ĝi diktas aŭ rakontas historion, kies komprenon ĝi kontrolas per demandoj. Fine vidu la *procezon de la taskosolvado per parolanta komputilo!*



KOUTNY Ilona instruas esperanton kaj komputilan lingvistikon en la Lingvistika Katedro de Eötvös Universitato (Budapest) kaj kunlaboras en komputila parolprilaboro en la Budapeŝta Teknika Universitato.

Bibliografio

K. Ahmad, G. Corbett, M. Rogers, R. Sussex (1985): Computers, Language Learning and Language Teaching. Cambridge: Cambridge University Press.

Ray Gérard (1986): Komputiloj en instruado. En: IPR 1986/3, pp. 10-22.

Marie-Thérese Janot-Giorgetti (1985): Parol-rekono kun limigita vortaro, ĝia apliko en la lernado de parolataj lingvoj. En: Perkomputila tekstoprilaboro. Red. I. Koutny. Budapest: SEC

Kecskés István (1987): Mikroszámitógépek használata az idegennyelvoktatásban [Uzado de mikrokomputiloj en la instruado de fremdaj lingvoj]. Budapest: Tankönyvkladó

Kisfaludy Katalin (1988): Apliko de sintezita parolo en la komputila instruado de Esperanto. Faklaboraĵo, ELTE Esperanto-fako


Koutny Ilona, Olaszy Gábor (1987): Fonetika fono kaj raligo de Esperantlingva elektronika parolgenero. Aperonta en la eldonaĵo de la konferenco Esperanto 100-jara, Vieno

Koutny I., Olaszy G., Kisfaludy K. (1988): Esperanto speech synthesis and its application in language learning. En: Hungarian Phonetic Papers 19. Budapest: MTA Nyelvtud. Int. pp.47-54.

Stefan MacGill (1987): Instrui per aktorado. En: IPR 1987/2-3, pp.22-29 k Paroligi per rol-ludoj. En: IPR 1988/1, pp. 32-38.

Perkomputila instruado. Internacia Komputado 1985/2

Bruce A. Sherwood (1981): Sintezo de esperanta parolado. En: Kibernetiko de la homa lingvo. Red. H. Frank, Yashovardhan, R. Cziske. Budapest: HEA k Paderborn: Inst. pri Kib. pp. 63-74)



Demonstro de ESPAROL dum la Universala Kongreso en Roterdamo

INSTRUADO DE ESPERANTO PER PAROLANTA KOMPUTILO

KISFALUDY Katalin

Esperanto-kurso por komencantoj per komputilo

Kadre de baza kurso, organizita de Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto, estis elprovataj Esperanto-instruprogramoj. Ili estas skribitaj en la programada lingvo BASIC por komputilo Commodore-64, kun apliko de la *parolgenera sistemo ESPAROL,* kiu provizas la komputilon per parolkapablo, t.e. ĝi eldiras iun ajn tekston skribitan laŭ la Esperanta ortografio.

La programpakaĵo servas al la unua plifortigo post lernado, al *individua ekzercado* de gelernantoj, kiuj dum la elprovado partoprenis en du tradiciaj studhoroj gvidataj de instruisto, kaj poste sekvis studhoro de perkomputila ekzercado.

Dum la individua ekzercado la lernanto sidiĝas antaŭ la ekranon, enigas kaj ekfunkciigas la programon kaj, tajpante mem, respondas al la demandoj de la komputilo. La respondojn la komputilo tuj pritaksas kaj komunikas la rezulton, tiel la lernanto senprokraste ricevas informon pri la ĝusteco aŭ malĝusteco de sia respondo.

La programaron mi pretigis kiel *internacian kurshelpilon,* pro tio ĝi ne enhavas tradukajn ekzercojn, kaj ankaŭ tasko-priskriboj kaj erar-mesaĝoj estas Esperantlingvaj ekde la komenco. La komprenadon de la taskoj faciligas modelfrazoj, kiuj certigas, ke la lernanto sciu, en kiu formo la komputilo atendas la respondon, ĉu sufiĉas sola vorto, finaĵo, aŭ ĉu ĝi atendas tutan frazon. Alikaze povus okazi, ke lingve korektan solvon la komputilo ne akceptas pro forma eraro.

La programo *ne ligiĝas al lernolibro.* La ekzercoj estas uzeblaj aparte, sed nepre estas bezonata instruisto por gvidi la lernantojn, aŭ almenaŭ la kono de la ekzercenda materialo. La sistemo konsistas el 5 partoj po 7-8 programoj: gramatikaj, leksikaj kaj ludaj. La detala priskribo de la laŭgrade dismetita gramatika kaj leksika materialo troviĝas en mia faklaboraĵo.

Komputilaj taskotipoj

La programoj estas diverstipaj. *La sintezita parolo havas la plej gravan rolon* en tiu kazo, kiam ĝin ne akompanas surekrana teksto, ekz. en diktadaj ekzer-

coj aŭ kiam la komputilo aŭdigas mallongan tekston, kies komprenon kontrolas surekrane aperantaj demandoj kun proponitaj respondoj (KOMPRENO).

Plej ofte la sintezita parolo *kompletigas* tion, kio aperas sur la ekrano. Ĉion aŭdatan oni povas ankaŭ legi: taskojn, ekzemplojn, demandojn, laŭdon, erarmesaĝon. *Korektajn respondojn* la komputilo ĉiam elparolas, erarajn neniam. Estas du specoj de tiuj ekzercoj.

La unua estas *demand-responda,* kie temas pri *leksikaj ekzercoj.* La tasko KOLOROJ ekzercigas kolornomojn per koloraj grafikaĵoj de flagoj; KIOM DA praktikigas numeralojn. FAMILIO faras demandojn pri parencaj rilatoj; SEMAJNO pri la tagoj de la semajno.

Duaspecaj ekzercoj estas *transformaj* kaj ekzercigas *gramatikon.* En la tasko DEMANDO oni devas konstrui demandon al iu malsimil-kolore skribita frazelemento. En PRONOMOJ la tasko de la lernanto estas anstatŭigi en frazo iun substantivon per adekvata persona pronomo. En la taskoj IG KAJ IĜ kaj AFIKSOJ oni devas transformi frazon uzante iun afikson tiel, ke la transformita frazo havu la saman signifon. Apartan grupon formas ekzercoj, en kiuj la lernanto devas *kompletigi mankhavan frazon:* FINAĴOJ, A KAJ E, PREPOZICIOJ. En la unua kompletigendas radikoj per finaĵoj, en la dua oni elektas inter la finaĵoj *-a* kaj *-e,* en la tria mankas prepozicioj en la frazoj. En ĉi tiuj ekzercoj la lernanto devas respondi nur per sola morfemo.

Denove alia ekzerctipo estas, kiam la lernanto devas mem *konstrui frazojn laŭ iu modelo el donitaj vortoj,* ekz. komence laŭ *"La -o estas -o", "La -o estas -a",* poste *"preferi -i ol -i", "preferi -on al -o".*

La instruadon de numeraloj helpas la ekzercoj ADICIO kaj SERIOJ. En la unua, la programo generas entjerojn inter unu kaj cent, kiujn la lernanto devas adicii – memkompreneble litere, ne cifere. En SERIOJ aperas tri numeraloj surekrane, elementoj de logika vico. Trovendas la logika rilato inter ili, elkalkulotaj estas la tri sekvaj elementoj.

La ĝis nun traktitaj ekzerctipoj formas la kernon de la programaro, sed ekzistas aldonaj programoj, jam ne rigore ekzercoj, sed plie ludoj, kiuj servas al *amuza lernado,* kiel ekz. VORTLUDO: la komputilo hazarde miksas la literojn de vorto kaj aperigas tion. La tasko estas rekonstrui la originalan vorton. Helpe la komputilo ĉiam diras iun informon aŭ difinon pri la serĉata vorto. Pliaj tiaj estas KRUCENIGMO, la sola programo, kiu uzas la hungaran lingvon por la difinoj, kaj ANEKDOTO; en ĉi-lasta la lernanto mem povas krei la lastan frazon de anekdoto.

Praktika sperto en komputile helpata Esperanto-kurso

Kiujn avantaĝojn havas la apliko de komputilo en la instruado? Plej gravas, ke la komputilo ebligas individuan ekzercadon sur la plej alta nivelo. La *interaktiva ĉirkaŭaĵo* konstante aktivigas la atenton de la lernantoj. La komputilo rapidigas la ellernon kaj helpas pli racian tempodividon de la instruisto. Por malpli rapidaj, timemaj, necertaj lernantoj la komputilo rolas kiel sociiga faktoro; ne ekzistas pli pacienca instruisto ol komputilo. Gravas la *motiviga forto de la programoj:* ludaj elementoj, grafikaj solvoj kaj koloroj forte altiras. La sintezita parolo multe avantaĝas pro la pli homa rilato kun la maŝino.

La bazan kurson partoprenis kaj infanoj kaj plenkreskuloj. Pri infanoj estis klare, ke ilin allogis al la kurso la komputilo, ne unuavice la ideo de internacia lingvo. Sed ankaŭ plenkreskuloj volonte ludis per la komputilo, ĉar antaŭ la ekrano ili ne sentis eĉ por momento, ke ili estas lernantaj, ekzercas, faras devigan taskon. La individua ekzercado ĉiam restis por ili ludo, sendepende de tio, ĉu ili uzis ludprogramon aŭ gramatikan ekzercon. Tial eĉ post trihora lernado ili ne laciĝis.


Perkomputila instruado rapide disvastiĝas. Espereble en la estonteco pli kaj pli multaj Esperanto-instruistoj profitos el la ebloj de komputilo, kies funkcio estas helpi kaj ne anstataŭi instruiston.

Bibliografio

Kisfaludy K. (1988): Apliko de sintezita parolo en la komputila instruado de Esperanto. Fakliboraĵo. ELTE.

Koutny I., Olaszy G., Kisfaludy K. (1988): Esperanto speech synthesis and its application in language learning. En: Hungarian Phonetic Papers 19.

KIE ? KIE LA MUSOJ KAŜIĜIS ?



Ni kore dankas al André Herrmann el Winterthur, Svislando, pro ĉi tiu pedagogie interesa bildo. Ĉu vi sukcesos trejni la musojn en via lernejo tiom efike ekzercigi la prepoziciojn? "La instruisto saltas sur la seĝon!" Pli taŭgaj por la akuzativo de direkto, eble?

ANTINOMIO DE LERNEJA LINGVAĴO AL LA APLIKEBLA

ERNŐ CSISZÁR

Ordinaraj lernejoj ne povas plenumi siajn devojn: amasegoj de junuloj forgesas la lingvon tie lernitan, tre rapide; ilia lingvoscio fariĝas aplikebla neniam. De tempo al tempo ardiĝas la disputo inter koncernuloj: ĉu pli gravas parolkapablo ol ekposedo de gramatikaj reguloj? Kion sciu cetere lernantoj: ĉu legi, skribi, kompreni aŭ paroli? Samtempe ĉiuj ĉi celoj ne estas atingeblaj, sekve la lerneja lingvaĵo fariĝas krude kripligita. Eĉ por la idoj de la elita tavolo restas ne pli ol du elirvojoj: alproprigi fremdan lingvon helpe de la familio – do ekster la lernejoj – aŭ ekposedi ĝin en specialaj edukejoj, fonditaj precipe je profito de privilegiitoj. En la unua kazo oni instruigas la infanojn ekde frua aĝo private eksterlande, en fremdlingva medio. En pluraj landoj funkcias kelkaj lernejoj – en Hungario ĵus estis fonditaj dulingvaj gimnazioj –, kie la aplikado de la akirita lingvoscio okazas surloke: duono de la studobjektoj estas instruata fremdalingve.

Estus nefacile vicigi nur la skolojn de la metodikistoj, kiuj celis pli efike instruigi fremdajn lingvojn al infanaj amasoj, la tendenco mem tamen estas klara: antaŭe la instruado de la gramatika sistemo havis primaran lokon, nun, male, oni paroligas la infanojn, celante transigon el arbitre elektita minimuma lingvaĵo al nivelo jam aplikebla.

Esperantistaj pedagogoj bedaŭrinde blinde sekvadis ĉiujn metodikajn modojn, dumvoje ili ŝanĝis la veran celon je pseŭda. Anstataŭ helpi la infanojn iel ekkoni Esperanton, oni batalegas por enlerneja egalrajtigo de Esperanto, strebadas por formi el ĝi ordinaran studobjekton: estu ĝi tia, kia estas iu ajn alia, kiu povu malgajigi, enuigi, suferigi la infanojn dum plena jardeko, se ne pli longe, same kiel en kelkaj orientaj landoj la Rusa.

Tiun ĉi celadon spegulas tezoj pravigitaj kelkfoje ankaŭ far UEA, same la seniluziigaj faktoj: ekzistas landoj kun organizita grupo de pedagogoj sen lingvokursoj. Por instrua laboro la pedagogoj ne havas tempon, ilia energio elĉerpiĝas dum farado de strategiaj planoj, kompilado de petleteroj, per kiuj ili senlace bombardadas ministeriojn, aŭtoritatulojn. Same malagrablas alia sperto: en landoj, kie oni sukcesis oficialigi Esperanton, rimarkinde malkreskas la interesiĝo al ĝi. Post la "oficialigo" oni povas "produkti" malpli da esperantistaj infanoj ol eblis antaŭe en malpli konvenaj juraj cirkonstancoj.

En lernejoj, t.e. inter burokratismaj kondiĉoj fariĝus el Esperanto ordinara lerneja lingvaĵo, absolute simila al aliaj, do preskaŭ plene senutila.

Prezenti ian ĝeneralan formon de lingvaĵo lerneja, kiun oni instruas, respektive alproprigas (ofte ambaŭ nur teorie) — tio estas nesolvebla problemo. La unuecon certigas la lernoplanoj, lernolibroj, la unueca agado de pedagogoj. De lando al lando ankaŭ tiuj faktoroj multe malsimilas. Plej okulfrapaj estas la diferencoj, kiuj devenas el ideologiaj-politikaj pripensoj. Plurfoje eblus pruvi, ke la lernolibroj mem antaŭ ĉio celas fortigi politikajn idealojn, t. e. doni falsajn bildojn pri la reala vivo, kaj ne gravas, ke dum la uzado de tiuj ĉi libroj la lingvo-alpropriga procezo fariĝas kvazaŭ akcesora.

En certaj landoj la instruplanoj por ĉiuj fremdaj lingvoj pli-malpli estas la samaj, ankaŭ la lernolibroj multe similas, ties aŭtoroj verkas laŭ anticipe ricevitaj postuloj, direktivoj. Sed en la praktiko inter la lernejoj mem tamen estas enormaj diferencoj, kiujn kaŭzas precipe financaj kaj laborfortaj kondiĉoj. Vilaĝaj lernejoj, kie eble eĉ diplomitaj fakinstruistoj forestas, ege postrestas; sed urbetoj same ne povas postsekvi urbegojn; ĝenerale esence gravajn avantaĝojn havas la ĉefurboj, respektive ties centroj kompare al la provinco kaj al la periferioj. Tavoleto — danke al specialaj lernejoj — povas proksimiĝi al la "perfekta" lingvoscio, dume amasegoj faras tute superflue misproporciajn fortostreĉojn. Kvazaŭ kutime oni kulpigas pro malsukceso ĉu la instruistojn, ĉu la lernolibrojn, ĉu la bazajn konceptojn, kaj tenas sin al la opinio, ke per partaj plibonigoj tamen eblus atingi esencajn ŝanĝojn ĉi-rilate. Nuntempe en landoj, kie lingvoinstruado forte lamas, oni serioze planas elformi dum kelkaj dekjaroj popolon du-trilingvan. La loĝantaro devus scii minimume du fremdajn lingvojn, el kiuj unu devus esti aplikata aktive, la alia konata almenaŭ pasive.

Instruisto de lingvoj



(Dallos Jenő)

Samtempe statistikoj pruvas, ke en landoj, kie la lernokondiĉoj estas plej favoraj, plimulto de la enloĝantoj konas neniun lingvon krom la gepatra, kvankam tie oni povus utiligi la alproprigitan lingvon onidire ĉiutage, surstrate. Nenie en la mondo estas pli fortaj la ekonomiaj, komercaj, turismaj, kulturaj kontaktoj ol en la teritorio de la Eŭropa Komunumo. Tamen laŭ la plej freŝaj indikoj en landoj kiel Okcidenta Germanio, Francio, Hispanio kaj Italio apenaŭ

6 procentoj de la loĝantaro deklaras sin dulingvaj. En Anglio, memkompreneble, la rezultoj estas pli malaltaj, surprize eĉ en Belgio, kie pluraj lingvoj estas oficialaj kaj la loĝantaro malsamas laŭ gepatraj lingvoj, nur ties triono parolas du aŭ pli ol du lingvojn. Intertempe ekestas konstante kaj spontane du- aŭ plurlingveco dise en la mondo, kiun produktas ne la lernejo, sed la socia medio, ekz. en Ciganaj familioj.

Instruisto de biologio



La lernejo ĝuste nun produktas la plej evidentajn malsukcesojn, nun, kiam lingvoscio iĝas grava ankaŭ por simpluloj, precipe por intelektuloj, nun, kiam la ĝenerala evoluo postulus dulingvecon de milionoj, kiam lingvolernigo devus esti la plej esenca parto de la tuta lerneja instruado.

Rerigardante al la historio de la nunjarcenta lingvoinstruado, oni povas konstati, ke malgraŭ boniĝo de la sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj la fiaskigaj faktoroj multiĝis. Verajn rezultojn la lernejoj atingis ne en la "produktado" de du- aŭ trilingvuloj, sed en la unuecigo de naciaj, ŝtataj, literaturaj lingvoj. Oni sukcese detruis dialektojn en lernejoj, malebligis la uzadon de sia etnolingvo por amasoj da infanoj — rezultis antaŭ ĉio batalo kontraŭ minoritataj kulturoj. Oni aplikis, foje eĉ aplikas, senskrupule brutalajn manierojn: perforton, humiligojn, punojn eĉ fizikajn.

Spite al konstante akriĝantaj malkontento kaj kritiko, lernejaj entreprenoj interne fortiĝas, eĉ profitas el fuŝa laboro. Se aliaj entreprenoj — industriaj, agrikulturaj aŭ komercaj — produktas fuŝaĵojn, ili bankrotas; la lerneja sistemo, same misrezulta, elkovas nur pretekstojn por postuli pli grandan parton de la ŝtata budĝeto. Ju pli profundiĝas la eduka krizo, des pli fortiĝas interne la instruaj organizoj, minacante la interesojn de la socio.


Detruante lokajn tradiciojn, la ŝtata eduksistemo fariĝis enorma, monopola, plenpotenca, nekredeble inerta fronte al aktualaj lokaj pretendoj. Tiu inerto fontas precipe el tio, ke la tuta sistemo fremdiĝas, kvazaŭ sendependiĝas de la socio; la koncernatoj perdas sian eblon kontroli, esence influi ĝis la kernaj problemoj. Restas nur unu elekto: subiĝi al la supera volo. Individuaj kaj grupaj interesoj iĝas senindulge subpremitaj, perdiĝas ĉies fido je la lernejo. Tiuj ĉi gigantaj maŝinoj funkcias laŭ ŝtoniĝintaj reguloj kun potencega burokrataro, helpe de staboj de pseŭdo-sciencistoj kaj internaj brigadoj kontrolaj, labori-

gante en hierarkia sistemo armeojn da grizaj dungitoj, plej ofte malbone pagatajn instruistojn.

Vere, ke la temo mem ne postulas analizon de tiuj ĉi cirkonstancoj; la esperantistaron pli interesas la sorto de la internacia lingvo en la lerneja sistemo.

Longe daŭris la strebado enkonduki Esperanton en la lernejojn. Iam ŝajnis esti ĝusta la espero: se ĝi estos instruata komence nur en kelkaj lernejoj, la koncernaj potenchavuloj ekkonos ĝiajn avantaĝojn (facile lernebla, modeligebla, ligita al porhomara mesaĝo) kaj decidos disvastigi ĝin per la lerneja sistemo, sendepende de la Esperanto-movado. Tiuj esperoj ne realiĝas. Tute male: Esperanto malbonfartas en lernejaj cirkonstancoj. Eksperimentoj eĉ kelkjaraj alportis neniajn longdaŭre validajn rezultojn, Esperanto povis enradikiĝi nek okcidente nek oriente. Oni ne sukcesis sufiĉe interesigi la infanojn, inter pedagogoj ne kreskis ĝia reputacio, lernejaj instancoj ne malkovris en ĝi pedagogiajn valorojn.

Instruisto de gimnastiko



Krom hazardaj kaj sporadaj informoj oni povas trovi neniajn indikojn pri tiu Esperanto-lingvaĵo, kiun gelernantoj povis alproprigi lerneje dum unu aŭ pluraj jaroj. Se tamen ekzistas iuj raportoj, tiuj ne sufiĉe fidindas: ĉiam estas intereso por troigi la rezulton kaj prisilenti la mankojn. Tion tamen eblas tre facile pruvi, ke en la movado apenaŭ estas personoj, kiuj ellernis Esperanton plene en lernejo: plimulto de la aktivuloj lernis la lingvon aŭtodidakte. Nur en Hungario lernejoj devintus produkti jam plurmilojn da esperantistaj junuloj; tiuj same komplete perdiĝis kiel la milionoj, kiuj devus povi paroli la Rusan aŭ aliajn lingvojn.

Kelkaj landaj asocioj – baze sur imagitaj ĝisnunaj rezultoj – celas jam ne nur enkonduki Esperanton, sed egalrajtigi ĝin al ceteraj lingvoj. Oni ŝatus, se ĝi estus almenaŭ elekteble deviga, poste plene deviga studobjekto. Oni ŝatus, se la instruado de Esperanto okazus tute same kiel tiu de iu ajn lingvo, kun perfortaj notoj, en ĉiuj lernejo-tipoj. Je kio ĝi estas efektive utila, se ĝia instruado bezonas samajn metodojn, samlongajn instru-periodojn kiel ekzemple la angla?

Tiu simia imitado alportas plene adekvatajn rezultojn. Estas jam sufiĉe multaj infanoj, kiuj post kvarjara lernado de Esperanto scias preskaŭ nenion,

ne kapablas kunmeti elementajn frazojn. Kredeble pluraj reprezentantoj de la esperantistaro serioze pensas: sufiĉas trudiĝi en la lernejojn, poste ĝui la gloron – pluajn laborojn la ŝtato delevos de la ŝultroj de esperantistoj, kaj la ŝtataj instancoj mem povos, laŭ lerneja maniero, esperantistigi la tutan socion, pluraj ŝtatoj la tutan homaron.

La leĝa stato de Esperanto estas la plej konvena en Hungario kaj Bulgario, tamen iu ajn povas konstati, ke en diversaj aranĝoj pedagogoj kaj infanoj el tiuj du landoj ne superas siajn kolegojn alilandajn. En Hungario, dum porinfanaj okazaĵoj, ofte partoprenantoj ĝuste el Bulgario senĉese krokodilas: kaj la infanoj kaj la gvidantoj ne komprenas Esperanton. Foje eĉ tiuj instruistoj apenaŭ scipovas balbuti en Esperanto, kiuj prezentas modellecionon dum pedagogia seminario.

Instruisto de kemio



En lernejoj multe pli gravas ŝajnigi ol fari laboron. Se en iu lernejo Esperanto estas instruata, la gvidantaro klopodas profiti el tiu ĉi fakto. La efektivan scion de la infanoj neniu eksterulo kapablas prijuĝi, krom esperantistoj – sed oni povas facile kreskigi la reputacion de la lernejo, se la infanoj ofte prezentiĝas antaŭ publiko: kanto- kaj dancovesperoj, ekspozicioj kaj solenaĵoj multe gravas por tio. Misuzi infanojn je individua profito, laborigi ilin dum porokazaj eventoj, ekspluati ilin – je tio ankaŭ Esperanto povas esti konvena. La lerneja gvidantaro kontentiĝas je la akcesora agado de enlernejaj Esperanto-grupoj.

En lernejo oni ŝatas infanojn mezkapablajn. Dum la uniformiga strebado ili kondutas plej konvene. La bonkapablaj ne volas enue, malrapide antaŭeniri, la postrestintoj ne kapablas samritme evolui. Konfliktoj ekestas ĝuste pro tiuj du tipoj. Studobjektojn la lernejo aranĝas malsame pro ekonomia bezono, modo aŭ lokaj cirkonstancoj, ordigas ilin kvazaŭ hierarkie, laŭ agnoskata valoro. En tiu ĉi sistemo la *humankarakteraj* studobjektoj flankenpuŝiĝas, eventuale eĉ lingvoj, kaj Esperanto memkompreneble staras ĉe la fino. Sekve oni simple ne tolerus, malpermesus aktivadon plusan de fervora instruisto, kiu klopodus pli serioze, pli elane kaj pli rapide instrui Esperanton ol planite, ol permesite. Tial Esperanto estas interesa nur dum la unuaj studhoroj, kiam la infanoj ankoraŭ spertas ion, kio estas netipa, iasence stranga, eksterordinara. Poste, kiam oni kaptas la ritmon de la cetera instruado, la interesiĝo komencas regre-

si, vekiĝas enuo. Inter du maloftaj studhoroj, kiuj, pro la malgranda prestiĝo de Esperanto, estas en la plej maltaŭgaj tempoj, la infanoj grandaparte forgesas la pli frue alproprigitajn konojn. Eĉ en la plej kontentiga kazo la tempo sufiĉas nur por ripetado, por nesufiĉa okupiĝo pri la nova materialo. La infanoj scias nur la *aktualajn* partojn, kiujn la instruisto antaŭvideble priĵemandos. La efektiva celo – havi kompletan lingvoscion, posedi plenan lingvosistemon – forvaporiĝas, restas la ĉiutaga devo lerni por elteni dum kontrolado.

Instruisto de historio



Pri degeneriĝo de Esperanto en lernejaj cirkonstancoj liveras signojn studkonkurso aranĝata en Hungario. Post plurjara amatora okazigo, la Landa Pionira Organizo ekprizorgis ĝin, sed spite al favoriĝo de la cirkonstancoj (ekz. pli valoraj premioj), la nombro de sinanoncantoj kaj partoprenantoj malkreskas, la rezultoj tute ne imponas. Aliteme: en la t. n. Pionira Urbo de Zánka (same Hungario), pasintjare oni denove disponigis 120 lokojn por feriado de la plej elstaraj lernantoj de Esperanto. Oni intencis akcepti ankaŭ 20 infanojn eksterlandajn, sed fine venis neniu el Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Pollando kaj Jugoslavio (el aliaj landoj oni eĉ ne invitis infanojn). Verŝajne estus ege malfacile varbi en tiuj landoj esperantistajn infanojn, kiuj povus inde reprezenti tiujn per sia lingvoscio. Eĉ en Hungario, malgraŭ malaltaj kotizoj, oni povis anonci ĝis la unua limdato malpli ol 50 infanojn (nur 1 el la tuta Budapeŝto). Por eviti kompromitiĝon, HEA decidis certigi senpagajn lokojn al eminentaj esperantistaj infanoj kaj grandsume subvencii aliajn. Fine ĉiuj lokoj estis okupitaj, sed la rezulto mizeris. El iu urbo venis 40 infanoj, el kiuj 1 paroletis Esperanton. Eĉ inter la agnoskataj *eminentuloj* estis balbutulo, kiu ne povis respondi al jenaj demandoj: "Kio estas via nomo? El kiu urbo vi venis?" Nur tiuj kapablis senĝene paroli Esperanton, kiuj devenis el iel esperanta medio, kiuj alproprigis ĝin hejme, helpe de ne instruisto, sed gepatroj aŭ parencoj.

Esperanto instruata en lernejo estas valoro apenaŭ taksebla. Ĝia enkonduko en bazajn kaj mezajn lernejojn levis ĝian prestiĝon, sed pro la nealveno de la antaŭplanitaj, tre atendataj rezultoj, tiu ĉi prestiĝo de la internacia lingvo povas ne nur senspure perdiĝi, sed ankaŭ elvoki danĝeran precedenton. (En superaj lernejoj, universitatoj Esperanto povas enradikiĝi pli forte, ĉar tie ĉarlatanismo, altrudado – en la kazo de Esperanto – ne ludas esencan, ĝenerale eĉ ne akcesoran rolon.)

La spertoj klare indikas, ke lernejoj povus labori efike por Esperanto ne nepre per instruado laŭtradicia, sed per ĝusta informado pri la monda lingvoproblemo (kadre de historio, geografio, literaturo) kaj klarigado pri la raciaj solvoj, per larĝskala (ne izolita) instigado de la infanoj partopreni en mallongaj, intensaj kursoj ĉu en ĉu ekster la lernejo, kie eblu ankaŭ prizorgi samtempan aplikon de la akirita lingvoscio ne trude, sed en vere internacia medio.

Nuntempe en lernejaj cirkonstancoj ne eblas atingi rezultojn pri tri esence gravaj aspektoj de la sama laboro: informado (varbado), instruado kaj apliko. El tio oni plenumas nur duonon, trionon... Laboro farita one ankaŭ en la kazo de Esperanto valoras malpli ol nenia laboro.

Redaktora noto: ne forgesu, ke vidpunkto de aŭtoro ne nepre koincidas kun tiu de la redakcio. La ĉi-supran artikolon ni publikigas en la espero veki diskuton: ĝiaj konkludoj ŝajnas al ni baziĝi eble troe je Hungariaj spertoj – ĝi ja estis teksto de prelego en Hungaria kunveno. Ĉu Vi konkludus aliel, ĉu spertoj pri fremdlingva instruado en Via lando estas pli kontentigaj?

PRI PROJEKTO DE INTERNACIA ALTLERNEJA ESPERANTO-LERNOLIBRO: "FIEDLER-MATTUSCH: ESPERANTO – INTERNACIA LERNOLIBRO POR STUDENTOJ KAJ SCIENCISTOJ"

Doz. Dr. Sc. Hans-Jürgen MATTUSCH

Ekde 1988 en GDR ekzistas la eblo fakultative instrui Esperanton en universitatoj kaj altlernejoj. El tio rezultis la bezono ellabori Esperanto-lernolibron konvenan por studentoj kaj sciencistoj.

Elirante de la internacieco de Esperanto kaj de ekonomiaj motivoj, la nova instrumaterialo estas konceptita por uzo en altlernejoj kaj universitatoj de ĉiuj pri tio interesataj landoj de la mondo. Pro tio ĝi estas verkita tute cellingve, t.e. Esperante. Dum instruado memkompreneble eblas uzi gepatran lingvon por klarigoj; aldone plurlingva vortlisto estas projektita. La lernolibro ne taŭgas por individua studado.

Nia lernolibro estas ellaborata kaj en minimuma kaj en maksimuma versioj. Ĉi-lasta, projektita por eldoneja publikigo, kombinas parton por komencantoj (10 lecionoj, en kiuj ni klopodas kunigi ĉiutagan lingvaĵon kaj elekton el la ĝenerala scienca lingvo) kaj porprogresantan parton (tekstoj kun interdisciplina scienca temaro). La minimuma versio, planita kiel interna presaĵo por universitatoj kaj altlernejoj de GDR, ampleksas nur la parton por komencantoj. Sistemo de lumbild- kaj lumfoliserioj, sonbendoj aŭ kasedoj, porkomputilaj ekzercoserioj kompletigos la maksimuman version.

Jam post 5 lecionoj la partoprenantoj de la kurso regos la bazajn gramatikajn sciojn kaj kelkajn gravajn elementojn de la vortfarado, tiel ke – helpe de vortaro – eblos ekkorespondi kun eksterlandaj esperantistoj. En lecionoj 6-10 estos prezentataj la cetero de gramatiko kaj vortformado, krom kelkaj specialaj problemoj. Ĉi-parte ni celas la atingon de kapablo legi kun vortaro meze malfacilajn sciencajn tekstojn, kompreni fakajn prelegojn samnivelajn kaj modeste interkompreniĝi dum kunvenoj kaj konferencoj.

Post atingo de certa scinivelo – ĉirkaŭ leciono 6 – apud la sistema prezentado de gramatiko inkluziviĝos ankaŭ pli funkciismaj pritraktoj. Gramatikon kaj vortformadon ilustros laŭeble bone aranĝitaj kaj lingve simple formulitaj skemoj, tabeloj; specialan atenton ricevos sistemiga ripetado.

Aldone lerneblaj vortoj, fakultativaj tekstoj, rolludoj ks. helpos diferencigi laŭ scipovo en ĉiu lernetapo. Sufiĉaj ripet-ekzercoj disponeblos, ĉefe por evoluigi komunik-kapablojn.


Nuntempe pretas la unuaj 5 lecionoj, kiuj estos elprovataj en instruado en tiu ĉi jaro.

23a INTERNACIA KONGRESO DE

I.L.E.I.

(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

Gwent College of Higher Education
Caerleon, Kimrio
5 - 12 Aŭgusto 1989



Kongresa Temo:
"Motivado en la Lerneja Instruado de Esperanto"

Aliĝadreso:

A. Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, HR6 8QD, Anglio. — ☎ (0568) 3061

Sekretario:

M. Jones, 41 Causeway, Chippenham, Wilts., SN15 3DD, Anglio — ☎ (0249) 656041

La loko

Kimrio fieras gastigi la 23an Konferencon de ILEI. Vi spertos ke la lokaj instancoj bonvenigas nin tiel plenkore kiel ili jam bonvenigis du Britajn Kongresojn kaj fervojistan ferion dum la lastaj jaroj.
Caerleon troviĝas en Sudorienta Kimrio apud Newport. Ĝi estis la loka ĉefurbo de la Roma Imperio kaj montras interesajn restaĵojn de tiu epoko. Proksime troviĝas bela montara kamparo. La valoj de la Wye- kaj Usk-riveroj, Cardiff ĉefurbo de Kimrio kaj Bristol, antikva havenurbego.

La kongresejo

Ni kongresas en Kolegio de Altedukado. Ĉiuj ĉambroj disponas pri varma akvo, sed bonvolu kunporti propran mantukon kaj sapon. Ekzistas nur ok dulitaj ĉambroj, kiujn ni disdonos al la unuaj kiuj sendas petleteron. Krome, estas multaj komfortaj unulitaj ĉambroj. La konstruaĵo taŭgas por handikapuloj, malgraŭ ke ĝi ne estas perfekta.

Kotizoj

	£
Por la tuta semajno (loĝado, partopreno, kaj ĉiuj manĝoj)	155.00
Tagvizito	5.00
Tranokto kaj matenmanĝo	11.00
Tagmanĝo aŭ vespermanĝo	4.50
Kafo aŭ teo kun manĝaĵeto	0.50
Krompago por ne-membroj de ILEI	5.00

La prezoj estas kalkulitaj en britaj pundoj. Se eblas, pagu per tiu mono, aŭ aldonu egalvalore 2 pundojn por ŝanĝkostoj. Aliĝontoj post la unua de majo 1989 pagos aldonan sumon de 10 britaj pundoj. La duon- aŭ tuttaga ekskurso estas pagebla surloke.

Ĝeneralaj informoj

Pro la fakto, ke en Britio la somerferioj komenciĝas multe pli malfrue ol sur la kontinento, la ILEI-Konferenco en 1989 okazos *post* la UEA-Kongreso en Brighton, kiu finiĝas sabaton la 5an de aŭgusto. Krom la kutimaj programeroj (interkona, kultura, nacia, distra vesperoj, ekskurso, diverstipaj kursoj), la programo mencias fundan diskuton pri renovigo de la statuto kaj la regularo, diskuton pri la interna kaj ekstera funkciadoj de ILEI, kaj precipe referaĵoj pri la kadrotemo: "Motivado en la lerneja instruado de Esperanto". La debato kuniĝas kun la ĉeftemo de la "Tago de la Lernejo" en Roterdamo (1988).
Ideoj, sugestoj, proponoj pri diskutindaj programeroj estas nepre bonvenaj ĉe la prezidanto de ILEI aŭ ĉe la LKK-sekretario, same kiel eventualaj kandidat-referantoj pri la kadrotemo.
Ĉiu aliĝinto ricevos konfirmon en la formo de dua informilo, junie 1989, en kiu troviĝos pli da informoj pri la programo. Ĉi tiu ankaŭ aperos en la junio-numero de IPR.

Kiel atingi la kongresejon

Aŭtomobile: per aŭtovojo M4. Prenu elirejon 25 kaj sekvu vojon B-4596 al Caerleon.
Vagonare: al Newport kaj poste trafu aŭtobuson 2A, 2C aŭ 7 de la aŭtobusa stacio. Estas ofta servo.
Se ekzistas sufiĉaj petantoj, ni aranĝos transporton de Brighton al Caerleon tuj post la Universala Kongreso de UEA, kaj de Caerleon al Londono, por flugadoj kaj pramvagonaroj post la ILEI-Konferenco. Se vi uzos tiajn eblecojn, bonvolu indiki ilin sur la aliĝilo.

Cseh-seminarioj

ILEI, kunlabore kun IEI (Internacia Esperanto-Instituto) enkondukas en la programon de niaj konferencoj Cseh-seminariojn A, B kaj ev. C por Esperanto-instruantoj.
La celo de la seminarioj estas ebligi al Esperanto-instruantoj atingi specialecon de Cseh-instruisto. Aliĝintoj al Cseh-seminarioj ricevos informojn kaj programojn kiel prepari sin. Por ili ne necesas posedi bazan Cseh-formadon.
Atentu! Cseh-seminarioj estas aparte pagendaj, ĉar ili rilatas nur personojn, kiuj interesiĝas pri ili.
Prezo: Por la seminarioj A, B aŭ C po 70 guldenojn. La pagon bonvolu sendi al Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Poŝtĝiro 162626 aŭ bankkonto 48.16.78.557 AMRO (aldonu 9 guldenojn lastkaze).

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 23a Konferenco de ILEI en Caerleon, aŭgusto 1989

Familia nomo ..... Antaŭnomo .....

Profesio ..... Naskiĝdato .....Sekso .....

Strato ..... n-ro .....

Poŝta kodo .....Loĝloko ..... Lando .....

Telefonnumero .....

Bonvolu krucsigni:

Mi mendas dulitan ĉambron: ☐

Mi estas membro de ILEI: ☐

Mi manĝos vegetare: ☐

Mi sekvas jenan dieton: .....

Mi partoprenos Cseh-seminarion A. B, aŭ C kaj jam pagis ☐

ne pagis ☐

Mi intencas partopreni la krompagendan ekskurson: jes ☐ / ne ☐

Aliaj deziroj: .....

La kotizon de ..... britaj pundoj mi pagis je dato ..... ĉe la Banko T.S.B., Leominster, al la kontnumero 09090 268 kun la mencio "23a Konferenco de ILEI".

Mi deziras transporton de Brighton al Caerleon ☐

Mi deziras transporton de Caerleon al Londono ☐

Dato *Subskribo*

Spaco rezervita al LKK

La aliĝilo alvenis je ..... Aliĝnumero .....

La pago alvenis je ..... Sumo: .....

Ankoraŭ ŝuldas: .....

Ĉambronumero: ..... kun .....

PRIPAROLATA TEMPO – RELATIVA TEMPO

Odd TANGERUD

Du gravaj nocioj en la gramatiko de Esperanto

La *priparolata tempo* estas la tempo, kiun oni priparolas en frazo. Ekzemple en la frazo "Patrino bakas panon" la priparolata tempo estas nuntempo. Ankaŭ la frazo "Patrino estas bakanta panon" estas en nuntempo, ĉar la verbo "estas" indikas la priparolatan tempon. La participo "bakanta" estas predikativo al la subjekto, kaj nur ludas rolon kiel aliaj adjektivoj, ekzemple "Patrino estas bona". La adjektivo kvalifikas la substantivon. Adjektivoj kiel "bona" donas al la substantivo moralan econ. Participoj adjektivaj donas al la substantivo tempan econ rilate al la priparolata tempo. Tion ni nomas *relativa tempo*.

Ekzemploj pri priparolata tempo en nuntempo:

"Patrino bak**as** panon."
"Patrino estas bakanta panon."
"Patrino estas bakinta panon."
"Patrino estas bakonta panon."
"La pano estas bakata."
"La pano estas bakita."
"La pano estas bakota."

En la sekvaj ekzemploj la priparolata tempo estas pasinta tempo:

"Patrino bak**is** panon."
"Patrino estis bakanta panon."
"Patrino estis bakinta panon."
"Patrino estis bakonta panon."
"La pano estis bakata."
"La pano estis bakita."
"La pano estis bakota."

En la sekvaj ekzemploj la priparolata tempo estas venonta tempo:

"Patrino bak**os** panon."
"Patrino estos bakanta panon."
"Patrino estos bakinta panon."
"Patrino estos bakonta panon."
"La pano estos bakata."
"La pano estos bakita."
"La pano estos bakota."

Plua klarigo pri **relativa tempo**: En la esprimo "estas bak**anta**" **-ant-** indikas samtempecon al "estas". Do la ago "baki" okazas en la nuntempo.

En la pasiva esprimo "estas bakata" **-at-** indikas, ke la substantivo ricevas tiun econ samtempe kun "estas", do en la nuntempo.

En la esprimo "estis bakanta" **-ant-** indikas samtempecon al "estis". Do la bakado okazis en la pasinteco, ĉar "bakanta" ne havas absolutan tempon, sed tempon relativan al "estis".

En la pasiva esprimo "estis bakata" **-at-** indikas, ke la substantivo ricevis la econ "esti bakata" en la pasinteco, ĉar la participo havas tempon relativan al la verbo "estis".

En la esprimo "estos bakanta" **-ant-** indikas samtempecon al "estos". Do la bakado okazos en la venonteco, ĉar "bakanta" ne havas absolutan tempon, sed tempon relativan al "estos".

En la pasiva esprimo "estos bakata" **-at-** indikas, ke la substantivo ricevos la econ "esti bakata" en la venonteco, ĉar la participo ne havas absolutan tempon, sed tempon relativan al la verbo "estos".

La supraj klarigoj ankaŭ validas por la aliaj formoj de la ekzemplaj frazoj. Do mi traktos ilin iom pli rapide.

"La pano estas bakita."**-it-** montras antaŭtempecon rilate al "estas". En nia frazo ni priparolas nuntempan staton ("estas"), sed rilate al tiu priparolata tempo la bakado okazis antaŭe.

"La pano estis bakita." **-it-** montras antaŭtempecon rilate al "estis". Tio signifas en nia frazo, ke ni priparolas pasintan tempon ("estis"), kaj jam tiam la bakado estis farita. Rilate al "estis" ĝi okazis en antaŭtempeco.

"La pano estos bakita." **-it-** montras antaŭtempecon rilate al "estos". Tio signifas en nia frazo, ke ni priparolas venontan tempon ("estos"). En tiu venonta tempo ni povos manĝi la antaŭe bakitan panon, kaj tial ne bezonos malsati. Tamen ni nenion scias pri la tempo, kiam patrino bakis la panon, krom tio, ke la bakado okazis antaŭ la tempo de "estos". Do ni havas tre klaran ekzemplon pri relativeco inter la frazelementoj.

"La pano estas bakota." **-ot-** montras posttempecon rilate al "estas". Ni priparolas nuntempan staton ("estas"), sed rilate al tiu priparolata tempo la bakado okazos poste. Ni ne havas panon, sed ricevos ĝin estonte, se iu bakos ĝin.

"La pano estis bakota." **-ot-** montras posttempecon rilate al "estis". Tio signifas, ke ni priparolas staton en la pasinteco. Tiam la pano ankoraŭ ne ekzistis, sed la intenco fari ĝin ekzistis. La participo havas tempon relativan al "estis". Do en pasinttempa rakonto la bakado espereble okazos.

"La pano estos bakota." **-ot-** montras posttempecon rilate al "estos". La priparolata tempo ("estos) estas estonta. Je tiu tempo la bakado ankoraŭ ne estas realigata aŭ realigita. Rilate al la priparolata tempo la bakado estas realigota. Espereble la tempo ĝis realigado ne estos tro longa, por ke ni ne mortu pro malsato.

Jen kelkaj Zamenhofaj ekzemploj:

1. "Tio estas jam tute alia afero, tre subtila kaj postulanta longan priparoladon." (ZM, p. 2.). La priparolata tempo estas montrata de "estas jam". Do nuntempo. La participo "postulanta", kiu estas nuntempa participo, montras samtempecon al la priparolata tempo. Tiel ni havas du adjektivojn ("subtila" kaj "postulanta"), kiuj ambaŭ estas samtempecaj kun la afero, kiu "estas". Regulo: **-ant-** montras samtempecon al la priparolata tempo.

2. "Ili venos al la ĉi tie starantaj monumentoj." (ZFT, p. 54.) La priparolatan tempon montras "venos". Do venonta tempo. La participo "starantaj" laŭ la senco montras kvazaŭ eternan staton. Tamen ene en la frazo ĝi estas rilata al "venos", kiu estas la priparolata tempo, kaj neniu alia tempindikilo troviĝas.

3. "ĉiun abonanton, kiu ĝis la 10-a de septembro ne repostulos de ni sian restintan monon, ni rigardos kiel akceptintan la novajn kondiĉojn de abono." (ZOV, p.209.) La priparolatan tempon montras "ĝis la 10-a de septembro" kaj "repostulos". Do venonta tempo. Ni trovas du participojn, ambaŭ tempe rilatajn al 'ĝis la 10-a de septembro ne repostulos". Ili montras antaŭtempan staton aŭ agon en la priparolata tempo "repostulos". Regulo: **-int-** montras antaŭtempecon al la priparolata tempo.

4. "Jes, tiajn versojn oni skribas, kiam oni estas enamiĝinta, sed homo prudenta ilin ne presigas." (ZFU p. 80.) La priparolatan tempon montras "skribas". La subpropozicio "kiam oni estas..." rilatas samtempe al "skribas". La participo "enamiĝinta" rilatas antaŭtempe interne de la subpropozicio al "estas".

5. "Kiam vi estos plenumintaj vian laboron kaj sufiĉe ĝojintaj en ĉi tiu benita mondo, tiam — mi scias — vi ankaŭ venos al ni supren." (ZFK p. 132.) La priparolatan tempon montras "Kiam vi estos..." kaj "venos". Do venonta tempo. "Plenumintaj" kaj "ĝojintaj" estas pasintaj rilate al "estos" kaj "venos". La pasiva participo "benita" ludas pure adjektivan rolon, kiel ekzemple "bona". Ĝi tamen montras antaŭtempecan staton, kiu *ankoraŭ estas aktuala*. Regulo: **-it-** montras antaŭtempecon al la priparolata tempo.

6. "Ŝi intencas nun diri la lastan vorton de tiu interparolado, vorton esprimontan ian tre malfacile atingitan decidon." (ZM, p. 185.) La priparolatan tempon montras "intencas". La participo "atingitan" montras antaŭtempecon al la sama priparolata tempo, ĉar estas ja evoluo plenumita antaŭ la intenco. Regulo: **-ont-** montras posttempecon al la priparolata tempo.

7. "Apud ĝi mi kuŝiĝis observonte, por fariĝi saĝa." (ZFT, p. 132.) La priparolatan tempon montras "kuŝiĝis". Do pasinta tempo.

La relativa tempo "observonte" montras posttempecon al la priparolata tempo "kuŝiĝis".

8. "Mi ne povas trankvile akcepti la penson, ke vi tiun ĉi fojon denove forlasos mian domon ne konsilita kaj ne trovinta plenumon por viaj justaj postuloj." (ZM, p. 76.) La priparolatan tempon montras "povas...akcepti". Do nuntempo. La tempo en la subpropozicio estas venonta rilate al la nuntempo de la ĉefpropozicio.

Regulo: **Subpropozicioj havas relativan tempon** rilate al la ĉefpropozicio. En la sama ekzemplo estas du participoj, "konsolita" kaj "trovinta". Ili troviĝas en la subpropozicio kaj estas antaŭtempaj al la priparolata tempo interne de tiu subpropozicio.

9. "La virino, kiu komencis jam perdi rapidecon en sia kurado kaj lacigite haltis por sekundo, ekaŭdis la ŝin pelantajn minacajn kriojn." (ZM, p. 210.) La priparolatan tempon montras "komencis jam" kaj "haltis". Do pasinta tempo. La participo "lacigite" montras antaŭtempecon, kiu *ankoraŭ estas aktuala*. La participo "pelantajn" montras samtempecon al la priparolata tempo "ekaŭdis".

10. "Poste li vigle elrajdis sur la vendota aŭ interŝanĝota ĉevalo." (ZFK, p. 230.) La priparolatan tempon montras "elrajdis" Do pasinta tempo. Ni havas du participojn, "vendota" kaj "interŝanĝota", kiuj estas posttempaj al la priparolata tempo "elrajdis". Regulo: **-ot-** montras posttempecon al la priparolata tempo.

11. "La lingvo Esperanto estas al ili konata, sed tamen ili volas resti fidelaj al la Volapük ĝis la fino." (ZOV, p. 261.) La priparolatan tempon montras "estas". Do nuntempo. La participo "konata" estas uzata kiel ordinara adjektivo kaj montras samtempecon al "estas". Regulo: **-at-** montras samtempecon al la priparolata tempo.

Mallongigoj:

ZM – Marta, tradukita de Zamenhof
ZOV – Zamenhof: Originala Verkaro
ZFU, ZFT, ZFK – H. C. Andersen: Fabeloj, unua, resp. tria, kvara volumoj

Literaturo:

Olav Reiersöl: Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto, Oslo 1980.

NIA LETERKESTO

Ĝis nun ne havis okazon danki la aperigitan artikolon en IPR, mi nun kore dankas (...). Estime mi sendas konferenc-kajeron pri 21 prelegskizoj, kiujn mi preparis dulingve okaze de nia matematika konferenco, kiun organizis (...) nia departementa "Societo de Teknikaj kaj Natursciencaj Asocioj". (...) Per tiu kajero mi povas prezenti, kiel mi provas apliki E-on en mia ĉiutaga tasko. (...) Okaze de la konferenco ni organizis ankaŭ ekspozicion pri niaj faklaboraĵoj, inter kiuj esperantlingvaj publikigaĵoj de konferencaj partoprenantoj (6 artikoloj de 4 personoj, interalie mia aperinta en IPR).

Viktória Balogh,
Eger, Hungario

(...)Ĉar la oficiala nacia radio France Inter, aŭdebla ĉie en Francujo kaj ankaŭ en franclingva Belgujo kaj Svislando, dissendis Esperanto-kurson ĉiumatene en aŭgusto kaj komenco de septembro, pluraj personoj, kiuj estis aŭskultintaj tiun ĉi kurson, alvenis en nian klubon.

Hodiaŭ (la 10-an de jan. – la red.) en granda liceo de Saint-Etienne la sekretario de nia E-klubo prezentis al 100 geliceanoj Esperanton en la kadro de "Projekto de Eduka Agado" dum la oficialaj horoj de instruado. Tiu projekto estas helpita kaj financita de la administracio. (...)

Ĉu IPR povos prezenti, en kiuj landoj oni permesas aŭ malpermesas la E-instruadon en la oficialaj horoj de la instruado?

J. Dony, La Ricamarie, Francio

(IPR jam faras tion, publikigante regule aldonojn kaj korektojn al la daŭre ĝisdatigata broŝuro "La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo" de Germain Pirlot, havebla en la serio "Esperanto-dokumentoj" de UEA. Vidu laste IPR 1988/3, p. 34. – la red.)

Ĉi tiu spaco estas rezervita por tiu letero kiun vi ankoraŭ ne sukcesis skribi al IPR. Almenaŭ ne maltrafu la venontan numeron!

ILEI/UEA EKZAMENOJ LANĈITAJ EKSTER LA UK

Universala Esperanto-Asocio havas de longa tempo sistemon de ekzamenoj. Same ILEI ellaboris propran sistemon. UEA reformis en 1982, sub la gvido de estrarano Baldur Ragnarsson, ŝiajn ekzamenojn por restarigi la intertempe ne plu funkciantajn elementajn kaj mezajn nivelojn. Ekde tiam, la ekzamenoj estis proponitaj en la Universalaj Kongresoj, plejofte sub la gvido de Mag. Irena Szanser, je tiuj niveloj, kaj meze dudeko da kandidatoj sukcesis ĉiujare. Sed ekde tiam, la siatempa supera nivelo ĉesis funkcii, ĝi ja estis tiom stratosfer-nivela, ke nur kvin personoj en la mondo sukcesis akiri ĝin. Tion kaŭzis ne tiom la nivelo en si mem, sed la severaj postuloj pri legado kaj preparado, kiun povus plenumi nur homo kun multaj komplete liberaj monatoj.

ILEI kaj UEA nun pli proksime kunlaboras, kaj la unua kaj plej konkreta komuna projekto estas la reformado kaj disvastigo de komuna ekzamen-sistemo. Tio estas nun okazanta por la elementa kaj meza niveloj, sub la gvido de nove elektita Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) kun teorie sep kaj nuntempe ses membroj. En la monatoj de post la kongresoj, specimenoj de novaj testoj cirkulis kaj estis diskutataj. Jarfine tiuj testoj estis elprovataj praktike, kaj tio samtempe konsistigis lanĉon de la novaj ekzamenoj ekster la Universalaj Kongresoj.

Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds, okcidenta Svislando, liveris la faciligojn por prepara kurso kaj la ekzamena sesio. Spite la malfruan anoncadon, sep kandidatoj el kvar landoj prezentiĝis, ĉiuj por la meza nivelo. La ekzamenantoj aljuĝis al tri kandidatoj la plej altan noton 'Tre bone', al unu 'bone' kaj al tri 'kontentige', konstatintaj, ke la nivelo estis favore komparebla kun tiu en la UK.

Aliro al la ekzameno estis per skriba gramatika antaŭtesto, ĉar IEK volas, ke la ekzameno mem testu kiel eble plej rekte la kvar komunik-kapablojn: skribado, legado, aŭskultado kaj parolado – en izoleco kaj kombino. Alivorte, gramatika kono estas antaŭstupo al komunik-kapablo, sed ne mem mezurilo de tiu kapablo.

Kandidatoj montris sian skriban kapablon per la tasko verki 800-vortan eseon. La aŭskultan kapablon ili demonstris per skriba resumo de dufoje aŭdita teksto. Demandoj pri ĉi-foje popular-literatura teksto (sed alifoje povos esti popular-scienca teksto) testis ilian legan kapablon. En la parola parto oni ekzameniĝis unuope kaj devis ne nur montri kapablon libere paroli en Esperanto (klarigi bild-serion) sed ankaŭ interparoli (t.e. aŭskulti, kompreni kaj taŭge respondi).

La ekzamenantoj, Claude Gacond, Ilona Koutny kaj Stefan MacGill, povis praktike mezuri la taŭgecon de la ellaborita ekzamena materialo, kaj ankaŭ rikoltis reagojn poste de la ekzamenitoj. Surbaze de tio, IEK nun decidas pri la fina formo de la specimenaj testoj kaj la proceduroj, tiel ke povu aperi libreto, kiu tion klarigas al la publiko.

Perspektive, ni celas regule proponi la ekzamenojn ekster la UK kiel eble plej vaste, zorgante tamen pri unueco de la ekzamena nivelo. Iom post iom, tiuj ekzamenoj devas akiri sufiĉan rekonon kaj prestiĝon por ke oni rigardu ilin normigaj. Aldono de nova supera nivelo estas evidente grava posta paŝo, kiel ankaŭ decido ĉu aldoni kvaran fakan nivelon, kiun povus inaŭguri la jam preta pedagogia ekzameno. Sed ĝis la definitivigo de la enhavo de la unuaj du niveloj, eĉ ilia proponado restos limigita.

La venonta ebleco ekzameniĝi okazos en KCE en la 6a kaj 7a de aprilo 1989, kaj estos proponita antaŭe, ekde la 3a de aprilo, intensiva prepara kurso, kiu tamen ne estas deviga. La ekzamen-kotizo varias laŭlande, sed estas 30 SFR por loĝantoj de nord-okcident-Eŭropaj landoj. Aldoniĝas al tio la kutimaj restad-, manĝ- kaj kurs-kostoj ĉe KCE; rigardu la informojn pri la Metodika kurso en KCE aliloke en ĉi tiu IPR por havi ideon pri tiuj kostoj (sed duonigu la prezojn, ĉar nun temas pri unusemajna aranĝo). Pli precizajn detalojn pri tarifoj, loĝeblecoj kaj aliĝo petu de KCE, pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

La ekzamenoj estos kompreneble proponataj dum la UK en Brajtono kaj eventuale en la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Kerkrade (ĉu tiu loko ne estas konata al kelkaj el ni?) kaj en nia konferenco en Carleon.

La posta ekzamen-sesio en KCE okazos en la 11a kaj 12a de septembro 1989, kun nur unutaga pretiĝo en la deka. Sed en la semajno antaŭ tio (la 4a ĝis la 10a) okazos la tria ferio-semajno fervojema, pri kiu ekzistas jam aparta informilo ĉe KCE, kiu proponos serion de fakaj prelegoj, grup-diskutojn, plan-ludon kaj plurajn fervojajn kaj lag-ŝipajn ekskursojn. Tiu kurso estas ne nur faka, sed samtempe partopreniga kaj lingvo-ekzerciga. Se ĉeestos ĝin ekzamenotoj, ili ricevos dum tiu kurso pretigan konsiladon.

smg

LIBROJ, GAZETOJ, INTERESAĴOJ

ULRICH LINS: LA DANĜERA LINGVO.

Ni ankoraŭ ne sukcesis tralegi tiun ĉi preskaŭ 600-paĝan monografiegon, kiu pritraktas persekutadon de esperantistoj en ĉiuj lokoj kaj tempoj, tre fake kaj sobre, tamen ne seke – samtempe science kaj populare. Jen libro tradukinda, resuminda, recenzinda ankau por neesperantistaj medioj. En sekva numero ni iom pli detale revenos al ĝi – aŭ ĉu troviĝas iu inter niaj legantoj, kiu, leginte la libron, emus kaj pli fake kapablus ĝin recenzi?

PETRAS CVIRKA: KOKO KANTISTO KOKERIKISTO

Tri litovaj bestrakontoj bele tradukitaj de la ĉiama Adomas Vaitilavičius. Plaĉa, kolora, mezgranda kajero, kiu helpos pliŝtopi la ĝojinde malvastiĝantan breĉon de literaturo por-etula.

(Kvankam ne ricevitajn, ni menciu la belegajn kaj spritajn "La knabino, kiu ne volis iri al lernejo" de Siw Widerberg kaj "Praavo kaj la kotokukoj" de Sigrún Eldjárn, tradukita el la islanda de Ragnar Baldursson. Ili ankaŭ ideale kompletigas porinfanan kurson.)

RENATE KAJ WALTER KLAG: SUKERO NUTRADO KARIO

Dua, korektita eldono de broŝuro pri la malutiloj de sukero, kunfare de nia Aŭstria sekciestro. Unua ero en planata "Verda serio".

DER ESPERANTIST (1988/5)

la GDR-a bulteno publikigas artikolon de nia kunlaborantino Sabine Fiedler pri "Citiloj: ĉu nur iloj por citi?". Tiu revuo, kvankam daŭre malfrua samkiel IPR, estas eble la plej leginda en la mondo kompare ĝian prezon.

Je MONDO KAJ NI

ŝanĝiĝis la nomo de la periodaĵo UN KAJ NI. Ĝi tamen plutraktas, nur pli vastkampe, la eksterajn, ĉefe diplomatiajn rilatojn de nia movado. Redaktata de Nagata Ŭusink-Akiko, ĝi ankaŭ liveras dokumentojn uzeblajn por propaganda argumentado.

SURVOJE

nova, dumonata revuo, organo de UNIKO (Unuiĝo por Novtipa Internacia Kulturo); kultura, eĉ kulturteoria periodaĵo. Pri la principoj kaj celoj de UNIKO Vi povis legi en la aŭgusta numero de la revuo Esperanto aŭ en n-ro 1988/1 de Opus Nigrum, en la eseo "Survoje" de Aleksandr Fjodorov, el kiu ni citas: "Ni konscias, ke la tutmonda neesperantista kulturo dume superas la Esperantan subkulturon. Ni scias, ke la Esperanta kulturo povas superi ĉian nacian kulturon, kaj fariĝi avangarda kultura modelo, sen pretendo anstataŭi naciajn kulturojn. Ni strebas al kulturo kapabla detrui katenojn de homa spirita mallibero kaj pioniri la vojon de progreso por la homaro." La adreso de la redaktejo: *Aleksandr Fjodorov, SU-335045, Sevastopol-45, pk. 13.*

ESPERANTO - NUTZEN EINER PLANSPRACHE

(Eo – utilo de planlingvo)

Kvarpaĝa aldono al la decembra n-ro de "Verordnungsblatt des Stadtschulrates für Wien", konciza artikolo ĉefe pri la propedeŭtika valoro kaj komputila utiligo de nia lingvo. Verkita de Renate kaj Walter Klag (adreso sur la kovrilo de IPR).

LA LAŬTA VEKHORLOĜO – KAJ ALIAJ ATENTOKAPTILOJ

estas la titolo de nova leglibro por progresantoj, verkita de Stefan MacGill kaj eldonita de Hungara E-Asocio. Ĝi prezentas kvar amuzajn rakontojn, la unua pli simpla ol la ceteraj, ĉiuj kun demandoj kaj ekzercoj. Specimena ekzerco el ĝi aperis en IPR 88/3, p.11. Ĝi estas aktiviga kaj paroliga libro, ĝi prezentas ok rol-ludojn, taŭgajn por grupa uzo. Kompletigas ĝin notoj por instruistoj kaj vort-listo. Ilustris ĝin profesia desegnisto Pavel Rak. La ducentpaĝa libro kostas 90ft. en Hungario, SFR15,30 ĉe KCE, 21 gld. ĉe UEA.

MONDO DE UNIVERSITATO

Unu el la plej luksaspektaj Esperanto-revuoj estas la duonjara organo de Dankook Universitato en Suda Koreujo, *Mondo de universitato*, kiu atingis sian trian numeron. Ĉiuj tekstoj aperas kaj en la Korea kaj en Esperanto. La redakteja adreso: 8 Hannam-dong, Seoul 140-714.

Novaj kontaktoj por ELTE

La Esperanto-fako de Universitato ELTE en Budapeŝto strebas je pluaj internaciaj kontaktoj. Ĝi kunlaboras kun la nederlanda maŝin-traduka projekto DLT, ellaboranta la hungaran-Esperantan kontrastan sintakson. Kadre de tio, d-ro Klaus Schubert veturis el Nederlando por gvidi du-tagan kurson en decembro 1988 ĉe ELTE por la studentoj de la fako.

Kun Kultura Centro Esperantista kaj la biblioteko CDELI en La Chaux-de-Fonds, Svislando, komenciĝis kunlaboro fruktodona por ambaŭ flankoj: novembre kaj decembre ano de la fako, István Ertl, staĝis tie du monatojn; dum la skribo de ĉi tiuj linioj jam estas sekvinta lin Márta Dikman. Diplomitaj kaj -otaj studentoj pri Esperantologio povas plej efike helpi tie en biblioteka laboro, instruado, prelegado, ktp.

INTERNACIA METODIKA SEMINARIO (IMS)

La sepa IMS okazos en Poprad, orienta Slovakio, de la 26a ĝis la 30a de aprilo 1989. Ĉi tiu aranĝo iĝis tra la jaroj verŝajne la plej serioza regule okazanta faka aranĝo dediĉita al pedagogio, kaj jam meritas pli ol ĝian grandparte orient-eŭropan prelegantaron kaj aŭskultantaron. Dum tiuj kvin tagoj aŭdeblos pli ol tridek referaĵoj kaj prezentaĵoj pri la ĉeftemo "Lingvo-pedagogiaj aspektoj de Esperanto-instruado". La konferencejo konsistas el kvaro da domoj akiritaj de Slovakia Esperanto-Asocio meze de la malnova urbocentro de Poprad, urbo piede de la Tatra montaro. Loĝigo estas ne-luksa, en plur-litaj ĉambroj. Bufedo surlokas, varmaj manĝoj estos prenitaj en apuda restoracio. La Estraro de ILEI planas kunsidi tie tuj antaŭ la aranĝo, do ne mankos organizaj diskutoj kaj internacia etoso.

Por akiri pli da detaloj pri kostoj kaj kondiĉoj, por proponi fak-prelegojn pritemajn kaj por aliĝi, skribu al: SEA, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad; tel. (092) 2 68 95. Okcidentaj partoprenantoj povos ricevi oficialan invitleteron por helpi vizakiron kaj liberigon de la deviga monŝanĝado.

FREINET-RENKONTIĜO

De la 12-a ĝis la 22-a de julio 1989, internacia renkontiĝo de esperantistaj edukistoj (Freinet-pedagogio) okazos en STE-FOY-LA GRANDE, inter Bordozo kaj la Centra Montaro, en Francio. Sin turni al: Paul POISSON, 239 rue Victor Hugo, F-37540, ST CYR-SUR-LOIRE, Francio.

DUA INTENSIVA PEDAGOGIA-METODIKA KURSO

Ĉi tiu kurso, organizita de ILEI kaj KCE okazos en La Chaux-de-Fonds (Svisio) en la Kultura Centro Esperantista inter la 10a kaj 22a de julio 1989.

Celo: rajtigo al Esperanto-kursgvidado laŭ la internacie unuigita programo de UEA kaj ILEI.

La kurso okazos laŭ la *instruprogramo de UEA-ILEI*. La studado intensiva (6 horojn ĉiutage) finiĝos per *praktikaj kaj teoriaj ekzamenoj* kaj per ricevo de atestilo de UEA-ILEI, rajtiganta gvidi internaciajn Esperanto-kursojn. La kurson rajtas partopreni personoj, kiuj bone konas Esperanton kaj posedas almenaŭ mezan edukitecon. ILEI komisiis la didaktikan ĉefgvidadon de la kurso al magistrino Irena *Szanser*, metodologo pri fremdlingvo-instruado, kunlaboranto de la fremdlingva fako ĉe Varsovia Instituto por Klerigo de Instruistoj kaj membro de la Eduka kaj Ekzamena Komisiono de ILEI.

• *Ekzameno*: la praktika ekzameno konsistos el prezento de modelleciono enhavanta ĉiujn ŝtupojn de leciono mikstipa kun detala skriba hor-skizo kaj necesaj didaktikaj helpiloj. Diplomitaj instruistoj de fremdlingvoj povas esti liberigataj de la partopreno en la unuaj 5 kurstagoj kondiĉe, ke ili sendu fotokopion de siaj diplomoj kune kun sia aliĝo. Tamen ili devos submetiĝi al la praktika kaj teoria ekzamenoj kiel la aliaj. La aliĝintoj al la kurso kunportu la enlandan devigan instruprogramon por la Esperanto-instruado (se ĝi ekzistas) kaj sian plej ŝatatan Esperanto-lernolibron, por prepari surloke instruplanon, t. e. la detalan disdividon de la instrumaterialo por Esperanto-kurso. Aliajn instrumaterialojn, precipe metodikajn, eblos aĉeti surloke.

Kursmaterialo: Ĉiu aliĝanto tuj post la aliĝo ricevos didaktikan helpmaterialon por la kurso, nome *Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado* de Irena Szanser, 1988, 100 p. Ĉar la kurso estas tre intensiva, estas konsilinde nepre konatiĝi kun la materialo sufiĉe longe antaŭ la kurso.

Skriba tasko: Ĉiu aliĝinto devas sendi skriban laboraĵon (du- ĝis tripaĝan) pri unu el la dudek sekvaj temoj, antaŭ la komenco de la kurso. Krome ĉiu sin pretigu por parole respondi dum la kurso al la aliaj donitaj temoj:

1. La psikologiaj konceptoj historie influantaj la didaktikon de fremdaj lingvoj.
2. Ĉefaj instrumetodoj en fremdlingvo-instruado. Komparo de ili laŭ instrutipoj.
3. La rolo de la gramatiko en la instruado de fremdaj lingvoj laŭ diversaj instrukonceptoj kaj instrumanieroj rilate al instruo de la gramatiko.
4. Priskribo de unu el la ĉefaj instrumetodoj kaj komparo kun aliaj ĉefaj metodoj: la gramatiko-traduka – la rekta metodo – la aŭdo-lingva metodo – la kognitiva metodo – la Če-metodo – la miksita (elektanta) metodo. Kio ĝi estas? De kio ĝi dependas?
5. Ĝeneralaj psikologiaj faktoroj en la fremdlingvo-instruado. Rolo de konigaj, de afekciaj, de volaj procezoj.
6. Tipoj de instruhoroj en fremdlingvo-instruado.
7. Sinpreparo de la instruisto por la leciono.
8. Kriterioj por pritakso de la leciono.
9. Plej oftaj metodikaj eraroj en fremdlingvo-instruado.
10. Formoj de prezentado de la nova leksika materialo (kun ekzemploj).
11. Manieroj instrui gramatikon (kaj ekzemploj de ekzercoj).
12. Plifirmigaj ekzercoj (kun ekzemploj).
13. Tradiciaj kaj modernaj konceptoj pri la lingvo kaj parolo.

14. Principoj de fremdlingvo-instruado al infanoj kompare al plenkreskuloj.
15. Kio estas la instruprogramo, la instruplano, la instrumaterialo, la instruhoro, la detala horskizo?
16. Rolo de interlingva kaj enlingva interferoj dum Esperanto-instruado (kun ekzemploj). Kiel kontraŭi al ili? Ekzemploj de ekzercoj.
17. La kvar lingvaj bazaj kapabloj kaj la didaktiko de ilia evoluigo.
18. Ekzerco-tipoj por plifirmigo kaj por duonproduktiva parolkapablo (kun ekzemploj).
19. Ekzemploj de ekzerco-tipoj por produktiva parolkapablo.
20. Rolo kaj loko de kanzonoj en la unuopaj fazoj de la instruhoro.

Horaro: Alventago: alveno matene. 12h45: unua manĝo. 14h30-16h00 kaj 16h30-18h00: kurso. 18h30: manĝo. Vespere: memstudado. Sekvaj tagoj: 8h00: matenmanĝo. 9h00-10h30 kaj 11h00-12h30: kurso. 12h45: manĝo. 14h30-16h00: kurso. 18h30: manĝo. Resto de la tempo: memstudado. Dum la du antaŭlastaj tagoj okazos praktikaj provlecionaj ekzamenoj dum la kurs-horaro. Lasta tago: teoria parola primetodika ekzameno dum la antaŭtagmezo. Fermo de la kurso kaj disdono de la atestiloj: 15h00.

Prezoj: tuta aranĝo (kurso, manĝoj kun trinkaĵoj, tranoktado) kostas kun tranoktado en ĉambro kvarlita svisajn frankojn 810.- (redukto por studento kun atestilo: SFR 50.-), en dulita: SFR 900.-, en unulita: SFR 1080.- Redukto por diplomitoj nepartoprenantaj la unuajn 5 tagojn estas 30 %.

Aliĝo: ĝis la fino de aprilo 1989 estu sendita al KCE, PF. 779, CH-2301, LA CHAUX-DE-FONDS (Svislando) kun la sekvaj sciigoj: **a,-b,** nomoj familia kaj individua; **c,** sekso; **d,** naskiĝdato; **e,** gepatra (ĉefa) lingvo; **f,** aliaj lingvoj (nivelo); **g,** profesio aŭ nunaj studoj; **h,** adreso; **i,** telefonnumero; **j,** en kiomlita ĉambro vi deziras tranokti; **k,** konfirmo de la aliĝo per antaŭpago de SFR 300.- al la poŝtĉeko 23-2921-8 KCE, La Chaux-de-Fonds (la poŝtĉekkonta centro estas la urbo mem). Pagoj eblas per eŭroĉekoj; **l,** dato kaj subskribo. *Noto*: ni listigos la aliĝojn laŭ la alveno de la koncernaj antaŭpagoj. Ni povas akcepti maks. dudek kursanojn.

ANONCOJ KAJ RAPORTOJ

Cseh-metodo sur video-kasedoj

Internacia Esperanto-Instituto (IEI) pretigis serion de 6 video-kasedoj VHS-PAL-G (E-180) (daŭro: 18 horoj) pri la kursoj por komencantoj, por ebligi al gvidantoj de Cseh-seminarioj je grado A montri la metodon en profesia plenumo de Auldrey Childs-Mee, se ne disponeblas profesia Cseh-instruisto kaj komencantaj lernantoj. Por bone kompreni la metodon, oni devas vidi ĝin en la praktiko, teoria scio pri la metodo ne ĉiam sufiĉas (tion ni spertas dum la seminarioj).

La serion akompanas instrukcioj, kiel plej efike uzi ĝin por komprenigi al E-instruantoj, KION oni povas ŝanĝi kaj kiamaniere adapti la gramatikan materialon al instrukondiĉoj, kiuj diferencas de tiuj en la libro de BAZA CSEH-KURSO. La bendoj montras 12 renkontiĝojn, kovras preskaŭ duonon de la materialo de BAZA CSEH-KURSO kaj prezentas teknikerojn de CSEH-metoda instruado en la praktiko.

La celo de tiu serio NE estas instrui laŭ ĝi, sed NUR prezenti modelon de MODERNA CSEH-metoda instruado profesinivela. Uzi ĝin rajtas NUR kompetentaj pedagogoj aprobitaj de IEI. Aĉeti ĝin ĉe IEI rajtas NUR landaj pedagogiaj instancoj, kiuj okupiĝas pri edukado de E-instruistoj. La prezo estas 500 US$.

TAMEN...

por ebligi efike uzi la video-materialon, IEI faris ekstrakton el la tuto kaj limigis ĝin ĝis 3 video-kasedoj kun la daŭro de 12 horoj. La prezo de tiu serio estas 250 US$ inkl. sendokostojn. Ĝi estas en la sistemo VHS-PAL-G (Eŭropa), sed eblas transigi ĝin en sistemon VHS-PAL-M, NTSC (Usona), se venos mendoj el koncernaj landoj. La prezoj restas samaj.

La estraro de
Internacia Esperanto-Instituto

Muzik-instruistoj kaj -emuloj atentu

Aperis dekunu-lingva Orgenvortaro (nederlanda – angla – germana – dana – sveda – norvega – franca – hispana – kataluna – itala – Esperanto) kun pli ol 800 terminoj sur 300 paĝoj, kun abundaj ilustraĵoj. Kvankam la informilo, kiun ni ricevis, mencias nur favoran mendeblon *antaŭ la 15-a de novembro 1988*, ni ta-

men komunikas la adreson, ĉe kiu certe eblas plua informo kaj mendo:

CEOS VYW, Suikerdijkstraat 40, B-2730 Zwijndrecht, Belgio.

Esperantistaj prelegantoj serĉataj

Estimataj,

komisiite de UEA, mi preparas sliparon pri esperantistoj, kiuj kapablas prelegi en esperanto. Ni celas krei informbankon por la landaj asocioj, kiuj deziras organizi prelegvojaĝojn aŭ inviti prelegantojn okaze de renkontiĝo. La informoj petitaj estos komunikataj nur al Landaj Asocioj, Fakaj Asocioj, membroj de UEA. Ili ne publikiĝos. Vi cetere povos ĉiam ajn peti, ke via nomo ne plu estu en la sliparo "Prelegantoj". Bonvolu respondi nur se vi plenumas jenajn kondiĉojn:

– vi ŝatas/us prelegi eksterlande;

– vi estas sufiĉe nelaciĝema por vojaĝi de lok' al loko, prelegi, intervjuiĝi, ktp.;

– vi perfekte regas esperanton;

– vi perfekte regas la temojn, pri kiuj vi pretas prelegi;

– vi kapablas paroli antaŭ diversaj publikoj.

La formularon bonvolu peti ĉe la suba adreso. Se vi konas aliajn homojn, kiuj plenumas la deziratajn kriteriojn, bonvolu komuniki al mi iliajn nomon kaj adreson, mi kontaktos ankaŭ ilin.

Kore salutas

Claude Nourmont, komitatano de UEA
2 om Klaeppchen
L-5682 Dalheim
LUKSEMBURGIO

En 1991 okazos la 25-a Internacia Konferenco de ILEI. Por festi tiun datrevenon, la estraro de ILEI organizas konkurson por verki la historion de la asocio ekde la komenco de ĝia ekzisto.

La arkivoj de ILEI troviĝas en multaj lokoj, kaj estas instiga okazaĵo por
– serĉi kie ili troviĝas;
– kolekti ilin;
– uzi ilin,

ĉar el la riĉa pasinteco de ILEI ni certe multon povas lerni por nia nuna kaj estonta agado. Tro da spertoj perdiĝas en la E-movado; ni klopodos uzi ilin efike. Estas la plej granda honoro, kiun ni povas fari al niaj eminentaj antaŭuloj.

Dum la XX-a Konferenco en Louvain-la-Neuve (B) en 1986, Márta Kovács el Budapeŝto jam faris prelegon pri la historio de la lastaj 10 jaroj de ILEI/IPR. Tio eble estu elirvojo por pli ampleksa laboraĵo. Kandidatoj povas sin anonci ĉe la prezidanto de ILEI, Edward Symoens (adreso kovrile)

ILEI LABORTABLE

Ni lanĉas novan rubrikon en IPR, nek tro formalan, nek tro grandliteran, en kiu estraranoj kaj aliaj aktivuloj povas komuniki la staton de siaj projektoj, lanĉi alvokojn, priplori siajn sortojn kaj ĝenerale altigi la intensecon de la interna komunikado en la Ligo. Ĉi-numere ni invitas vin je plezur-krozo ĉirkaŭ la labortablo de la vic-prezidanto. Ekiro tuja!

Statistiko: En la antaŭa numero de IPR kaj en Juna amiko 88/3 aperis demandilo pri instruado. Post malrapida komenco, reagoj nun fluas regule kaj superas kvardek. Ĉar ili daŭre alvenadas, ni raportos la rezulton nur en IPR 89/1 kaj JA 89/2. Instigu instruistojn eĉ nun longe post la limdato sendi informojn. En Slovakio la enlanda instruistaro remultobligis la demandilon kaj petis ricevantojn informi kaj sian sidejon kaj ILEI – jen imitinda ekzemplo por tiuj landoj, kiuj ne memstare enketas. Parenteze, sur kelkaj enketiloj (feliĉe ne tiuj, kiuj aperis en gazetoj) la nomo de nia Ligo sukcesis misformiĝi: ILEI: Internacia Ligo de Esperantistaj Esperantistoj! Nur malmultaj resendintoj tion rimarkis, eĉ la slovakoj tre fidele transprenis la eraron en sian eldonon de la enketilo! La kulpinto, kiu restos sennoma, ankaŭ nur monaton poste rimarkis. Ĉu ne tamen interesa ideo – ĉu neniu volas fondi EEEE – Esperantisma Esperantistaro de Esperantistaj Esperantistoj, kun dudek-pinta verda stelo kiel simbolo?

Lerneja projekto: Pri ĉi tiu projekto ni diskutis en Kerkrade kaj Roterdamo. Ĝi celas krei nacilingvan materialon pri la monda lingvo-problemo por taŭge enkonduki Esperanton al lernejanoj. La dosieroj kaj eldonaĵoj troveblas sur la trakrozata labortablo, sed ne en prilaborata stato. Pro la alta prioritato kaj rimedoj donitaj en la 'Strategia Plano' de UEA por la eldono de internaciaj lerniloj, kaj pliaj samcelaj eldoneblecoj poste aperintaj en Hungario, la tabloposedanto transigis sian atenton al tiu tasko, opinianta ĝin pli urĝa ol la tamen dezirata 'Lerneja projekto'. Do, se iu el tiuj, kiuj somere pri tiu lerneja projekto interesiĝis, havas nun la emon, tempon, energion kaj kapablon transpreni la laboron, bonvolu vin anonci. Alie, ĝi ŝoviĝos al la dua duono de 1989.

Propono Texier: Nun ni krozu supren al dokumento, kiu ŝvebas super la labortablo, atendanta alteriĝ-permeson. Fakte, ni volonte redirektos ĝin al alia alteriĝejo, ĉar se ĝi ĉi tie instaliĝus, ĝi suferus sorton similan al la Lerneja Projekto. La ideo estas eldoni duonhoran sonkasedon en Esperanto, cele al lingvo-profesoroj regantaj almenaŭ kelkajn naciajn lingvojn. La teksto devos esti tre zorge verkita leksike kaj enhave, por ke tiuj lingvemuloj, ne-esperantistoj, tamen komprenu la mesaĝon (eble helpe de skriba teksto?). La teksto devus konvinki ilin, ke – Esperanto estas parolata lingvo; ĝi estas facile komprenebla kaj lernebla; ĝi ne konkurencos ilian profesion; ĝian rolon kiel faciligilon por la lernado de ceteraj etnaj lingvoj. S-ro Texier, estrarano de UEA, turnas sin al ILEI por peti nin proponi fakulojn por verki tian malfacilan facilan tekston. Kiu opinias la taskon farebla kaj volas kunlabori bv. anonci sin al s-ro J.L. Texier, 27, chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferte Alais, Francio. Laŭ s-ro Texier pri la kasedo "UEA povus eldoni grandskale; landaj asocioj aldonus nacilingvan klarigan leteron kaj povus, laŭ siaj buĝetoj dissendi al grupoj de lingvo-profesoroj sisteme, regione, okaze de renkontiĝoj..."

Literatura Foiro: Ĉi tiu revuo havas delonge pedagogian sekcion kun aparta redaktoro, kaj tiel aperigas artikolojn pri instruado, kiuj havas intereson ankaŭ por legantoj, kiuj ne estas profesie instruistoj. En momento de stulteco aŭ ebrio (povus temi pri la lasta, ĉar la aludita momento ja okazis inter 22.00h de la 31a de decembro kaj 02.00h de la 1-a de januaro; sed ankaŭ

povus temi pri la unua, ĉar la momento ja okazis inter 1948 kaj 1989) la tabloposedanto konsentis transpreni tiun fak-redaktoran oficon, kaj la taskon liveri ĉ. ses pedagogiajn artikolojn jare, ne verkinte mem kvinon da ili. Do, jen alvoko al la ILEI-anoj: ni bonvenigas bonstilajn enhavrikajn sed ne ege fakajn artikolojn, longajn ne pli ol ses manuskriptajn paĝojn, serioze kaj klare tajpitajn. Tio ne forlogu vin de la deziro verki por IPR, kiu ja povas aperigi pli fakajn kaj pli longajn artikolojn, kaj pli ol ses jare. Kiu proponas identan artikolon al la du revuoj estos pune tuj enoficigita kiel la dumviva kasisto de EEEE.

Krozo-fino, ĝis!
smg



En la venonta numero...

ni okupiĝos pri *planado.* Ni analizos kaj prikomentos la Strategian Planon de UEA, akceptitan de ĝia Komitato pasintjare kaj malfermitan por diskutado. Nia interesiĝo kompreneble centriĝas je ĝiaj edukaj aspektoj, kiuj ja havas centran rolon. Ni prezentos ankaŭ projekton de laborplano por ILEI, verkitan de nia prezidanto, cele unuflanke al diskutado inter la membroj, kaj aliflanke al gvidado de nia laboro.

Sed ne mankos fakaj artikoloj (i.a. ampleksa kontribuo pri lingvaj ludoj) kaj niaj kutimaj rubrikoj pri renkontiĝoj, aperintaj pedagogiaj eldonaĵoj kaj ceteraj alvokoj. Ĉi tiuj rubrikoj estas je la dispono de la membraro; sendu alvokojn kaj tekstojn al la redakcio!

Fakaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj. Sendante artikolon, bonvolu aldoni kelkajn liniojn pri vi mem – biografiajn detalojn aŭ informojn pri via profesio aŭ movada agado, por ke ni pli bone konu unu la alian.

Ĉu vi povas imagi ...

pli instruan, pli amuzan ekzerc-materialon por kursanoj ol estas *MONATO*, la internacia magazino sendependa? — Certe ne!

Do instigu la fervoron de viaj kursanoj, abonante kolektive por ili dum almenaŭ duona jaro — minimume 10 abonoj! — ĉi tiun unikan revuon. Se vi mem transprenas la distribuadon, vi ĝuas rabaton de 25%! Ĝin vi povas, laŭ bontrovo, uzi por vi mem aŭ donaci al viaj kursanoj. Krome, vi ankaŭ povas aĉeti por viaj kursanoj *malnovajn* ekzemplerojn kun rabato de pli ol 50%!

Sekve, ne hezitu skribi tiucele al la eldonejo: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antverpeno.

Cetere, ni serĉas ankoraŭ *kunlaborantojn* por la revuo, kaj kontraŭ honorario! Se vi havas intereson verki artikolojn, skribu — tiokoncerne ne al la eldonejo — sed al la redakcio: S. Maul, Pferseer Str. 15, D-8900 Augsburg.

Zang Danchen, Gong Wai Xi, Shifan Daxue, Wuhan, Huazhong, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU, 1984) – Dazzini Mario (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Klemola Irja (SF, 1986) – Olsson Olle (S, 1986) – Toczyński Jozef (PL, 1986)
Sonnabend Helmut (D, 1987) – Dazzini Catina (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino : Alfredo Juan Valle, Santa Fé 497, RA-1708 Morón (B.A.)
Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉeĥio : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinujo : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanujo: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-8900 Augsburg
Germana D.R.: Till-Dietrich Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel
Hispanujo : Manuel López Hernández, Sol 75, E-41003 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : David Mager, P.K. 4246, IL-84142 Beer-Ŝeva
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanujo : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegujo : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando : Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92 547 Łódź
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Rûzena Vojtechová, Bytovky blok "B", CS-05960 Tatavanská Lomnica
Sovet-Unio : Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Sud-Afriko : Jape Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : J.E. Bachrich, Apartado 3833, YV-1010 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

esperanto
internacia lingvo

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

I N F O R M I L O 1/1989

Nur ses monatoj restas antaŭ la komenco de la 23a ILEI-Konferenco en Caerleon (Britio), de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto, tuj post la UEA-Kongreso en Brighton (Brajtono)...
Ĉu vi, aŭ iu membro de ILEI el via lando, intencas partopreni en ĝi kaj eventuale interveni en la diskuto pri la kadrotemo :"Motivado en la lerneja instruado de Esperanto ?"
Se jes, ĉu vi volas komuniki ĝustatempe lian/ŝian nomon al la kasisto de LKK, kolego Arnold Pitt , Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire, Britio, HR6 8QD.

Se ne, ĉu vi povas sendi , plej malfrue en junio,
a) mallongan raporton pri la instruado de Esperanto en via lando kaj eventualaj aliaj aktivecoj de via sekcio ;
b) kontribuaĵon pri la kadrotemo, kiun vi povas ekde nun grupe prepari, eĉ post enketo inter viaj membroj.En IPR/julio,sept.1988, p.22 vi trovas enkondukon al la temo fare de Arnold Pitt.Se vi konas artikolojn, librojn, enketojn,k.s. rilate al la temo, bonvolu sendi fotokopion aŭ referencon.
c) viajn sugestojn pri aferoj aŭ temoj, kiujn la estraro povus diskutigi dum la Konferenco.

****

La Pedagogia Komisiono de ILEI, sub la aktiva gvidado de nia vicprezidanto, finpreparas la dosieron "Internaciaj Lingvoekzamenoj" por la elementa kaj meza niveloj.Ni kolektas materialon por la supera nivelo kaj ni esperas eldoni la kompletan materialon broŝurforme antaŭ la UK en Brighton.
Se vi havas ideojn, sugestojn, proponojn, materialon pri tiu tre grava temo, bonvolu rekte kaj urĝe sendi ilin al Stefan MacGill (Zsókovár ut 46 IX 36, H-1157 Budapest.

****

La materialo, preparita de mag.Irena Szanser (Lewartoskiego 9 m 17, PL-00185 Warszawa) por kursoj kaj ekzamenoj pri instrurajtigo nun estas kompleta.Ni serĉas la necesajn rimedojn por eldoni ĝin libroforme.
La dua intensiva pedagogia-metodika kurso por rajtigi al Esperantokursgvidado laŭ la internacia unuigita programo de UEA/ILEI, okazos en la Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds de la 10a ĝis la 22a de julio 1989.La gvidantino estos mag.Irena Szanser.La provizore eldonitan materialon kaj la aliĝkondiĉojn vi povas ricevi ĉe la supra adreso.

La Internacia Pedagogia Revuo (IPR) nun aperas kvarfoje en la jaro kaj la eldonritmo reguliĝos en la daŭro de 1989.
Por ke la revuo spegulu la poresperanta pedagogia vivo tra la mondo, kaj estu vere internacia, la redaktoro daŭre bezonas multan, varian kaj eldonindan materialon (artikolojn, raportojn, novaĵojn, informojn, alvokojn, recenzojn, ktp.).
Por kunordigi la laboron kaj konstrui reton de kunlaborantoj, ni serĉas en ĉiuj landoj po unu korespondanton por kolekti taŭgan materialon kaj peradi inter la redaktoro kaj potencialaj kunlaborantoj.
Kandidatoj bonvolu rekte skribi al la redaktoro : István Ertl (Kecskeméti u. 13, H-1053 Budapest).

****

ILEI nur valoras kion valoras la sekcioj kaj la membraro ; ĝi ne estas abstraktaĵo ; ĝi ne ekzistas ekster la membroj.
Pro tio, ni insiste alvokas ĉiujn sekciestrojn
a) daŭre informadi en pedagogiaj medioj pri Esperanto ;
b) daŭre varbadi novajn membrojn kaj regule informi la malnovajn ;
c) starigi novajn kursojn ĉie kie eblas ;
ĉ) daŭre aktivigi la membrojn por prelegi, fari kurson, verki artikolojn, ktp.

****

La 24a Konferenco de ILEI okazos en Kubo (1990) .Pliaj informoj sekvos en alia informilo aŭ en IPR.
Kontaktadreso : Andrés Pinera Orieto, c/° K.E.A., Neptuno 201,Esq. Industria, Habana 2, apdo 2018, Kubo.

****

Depost la fino de 1987 ĝis hodiaŭ jenaj novaj sekcioj aldoniĝis al ILEI : Argentino, Ĉeĥio, Estonio(SU),Germana Demokrata Respubliko, Kubo, Slovakio, Zairio.
La sekciestroj aperos en la venonta numero de IPR .

Respondeca eldonanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Kalmthout.

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Nigerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Pirlot Germain, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende
Didaktikaj lud(il)oj : Sossois Georges, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESCO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedujo).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)